Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 22 — Trimonata **1/92**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: KOVÁCS Márta

Vic-redaktisto: Stefan MacGILL

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Kovács M., Ady Endre u.23-25 C
H-1221 Budapest
☎ + 36-1-226-3602 (hejma, kun respond-aparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

SCHIER, D-ro Norbert, Lernejo kiel praktikadkampo de la socialpedagogio 1
Infanoj ĉirkaŭ la mondo; raporto de la E-klubo de Freese, San Diego 12
TANGERUD, Odd, Retrospektiva rakontado kaj pluskvamperfekto en la Zamenhofa Lingvo 13
OLSSON, Ole, Infanoj trans la limojn; alvoko de la eks-kasisto 18
Konstatoj pri la nuna E-instruado; Raporto el Fortaleza, Brazilo 19
ERTL, István, Recenzo 21
SADLER, Mike kaj PIRLOT, Germain – Reagoj 24
El la informiloj de la sekcioj (Ĉinio, Germanio, Nederlando, Svisio, Brazilo) 25
MacGILL, Stefan, Protokolo de la ekzamenoj UEA/ILEI 1989-91 26
BARCSAY, Zsuzsa, Konferenca kaj Gimnazia Komuniko 29
HORST-KOLINSKA, Mila, Kiel instrui por ne perdi kursanojn? 30
STOICA, Angela, Reviviĝo en Rumanio. Raporto kaj aliĝpeto 32
Centoj da faroj kaj decidoj. La Estrarkunsido en Budapeŝto 33
Rezulto de la enketo pri lerneja instruado 1991-92 36
KOVACS, Márta, Postparolo de la nova redaktoro 40

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Stefan MacGill, Esö 7.III, H-1034 Budapest, Hungario.
Mesaĝoj tra HEA: (36 1) 1560.244 (telefone aŭ fakse)
Kunordigado, planado, eldonado, rilatoj UEA kaj la movado.

Vicprezidanto : Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono; tel.(314) 869-2303
Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj

Sekretario : Marija Beloševiĉ, Miškinina 130, YU-4100 Zagreb-Crnomerec, Kroatio, Jugoslavio;tel. (38 41) 57.60.92
Landaj sekcioj, membro-varbado, ekzamenoj

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (46 415) 501.52
Financo, konferenca organizado

Vic-sekretario : D-ro Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept. 29-34, North Part, Huazhong Normal Univ., TJ-430070 Wuhan, Ĉinio
Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio

Estrarano pri instruado Barcsay Zsuzsa, Bem Rakpart 25/B, H-1011 Budapest, Hungario; tel. (36 1) 201-2342
Servoj al instruistoj, metodikaj kursoj, trejnado de instruistoj.
Faka programo de Konferenco 92

Estrarano pri universitatoj D-ro So Jinsu, Koreio, Dept. de Ekonomiko, Univ. Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900; tel. (0331) 281-5500, faks (0331) 281-3604
Universitatoj, Konferenco 1994

PEDAGOGIO

LERNEJO
kiel praktikadkampo de la socialpedagogio

Dr. Norbert SCHIER (Germanio)

1. Antaŭrimarko

Fine de la sesdekaj jaroj oni iniciatis lernejajn reformojn kaj reformprovojn en Federacia Respubliko Germanio, kiuj alportis – krom multaj aliaj postulaĵoj – ŝancojustecon, sciencorientiĝon kaj povum-plialtiĝon intensive – kaj parte eĉ forte – en la lernejpolitikan kaj instru-sciencan diskuton, kaj tiuj reformoj hodiaŭ estas diskutendaj pli ol antaŭe, ĉefe pro iliaj negativaj efikoj. En la Jarcento de la Infano oni bezonis kiel pozitivan plifortigilon la Jaron de la Infano, por memori pri tio, ke eduk-institucioj kiel ekzemple lernejoj devas esti ankaŭ instancoj pri edukado. Tio estas banala konstato, pri kiu la infanmedicino tamen devis atentigi pro la lernejaj premo, trostreĉiteco kaj timo, hontigante vastajn pedagogo-rondojn. Hodiaŭ denove licas konstati, ke instruisto ne nur havas la funkcion de agento de nia tuta socio kaj ke li ne nur estas aranĝanto de lernprocezoj, sed ke li devus esti advokato de la infano.

Ekzistas krizokampoj pro anonimeco kaj misorientiĝo en la granda sistemo de la lernejoj, pro la povum-centreco kaj (parte ties sekvoj) la disciplinproblemoj, pro la dogmatisme pledata lerncelorientita instruformo kun fakta aŭ imagita povumkontrolo. Kaj tiujn krizokampojn ne plu povas plene konsideri la lernejpedagogio kaj ankaŭ ne la instruistoj pro tio, ke ili supozeble ne estas sufiĉe klerigitaj por tio.

Ankaŭ aliaj eduk-instancoj de la junuloj (kiel gepatra hejmo, familio aŭ edukhejmoj) troviĝas en krizo, kiu ne ĉiam ebligas ilin doni al la junuloj internan apogon, helpon, ekvilibron, konsultiĝon kaj ĝojon. Sufiĉe ofte la gepatroj estas trostreĉitaj pro la altaj postuloj de la lernejo kaj la eduka devo, parte ankaŭ pro tempomanko, ĉar kaj patro kaj patrino profesie laboras; parte pro la necerteco (ĉar ĉiuj pedagogiaj instancoj en la moderna pluralisma socio akcentas sian gravecon), parte pro familiaj problemoj kaj socia misorientiĝo.

Ni nur aludis la ĝeneralajn aspektojn, kiujn rilate la konkretajn indikilojn oni devus klasifiki kiel konsekvencojn, ekzemple rilate dissocialiĝon, junularkrimecon, drogo-misuzon aŭ sinmortigon. Tiuj aspektoj jam signalas, ke lernejpedagogiaj diskutoj kaj la lernejo kiel reala medio ne plu povas labori sen socialpedagogiaj kategorioj, metodoj kaj organizaj formoj.

Jam delonge inter lernejpedagogio kaj socialpedagogio troviĝas (por apliki vorton de la poeto Lessing) terura fosaĵo. Ambaŭ direktoj scias preskaŭ nenion unu pri la alia, kaj ili rilatas sufiĉe rezerviĝeme unu kun la alia. Eĉ pli: lernejo kaj socialpedagogiaj institucioj laboras preskaŭ komplete izolite unu

de la alia. La lerneja mondo mem postulas dum la instruista klerigo pli da kunlaboro inter lernejpedagogio kaj socialpedagogio kaj por la lernanto pli da kunlaboro inter lernejoj kaj socialpedagogiaj institucioj.

2. Historiaj konturoj en la rilato socialpedagogio – lernejpedagogio

Antaŭ ol diskuti kaj argumenti pri tio, kion devas fari lernejpedagogio kaj socialpedagogio kaj kie estas efektivigeblaj kondiĉoj por kunlaboro, ni prezentu mallongan historian retrorigardon.

En la 18–a kaj komence de la 19–a jarcentoj ni povas paroli kun certaj rezervoj pri unueco inter lernejo kaj socialpedagogio. Lernejo kaj junularhelpo, praktikadkampoj de la socialpedagogio, rigardis kiel unu el siaj ĉefaj taskoj integri infanojn el la malsupraj sociaj tavoloj en la regantaj sociaj valor-, norm-, kaj ordo-imagojn.


La pli kaj pli komplikaj laborprocedoj postulis pli da scioj kaj kapabloj de la laboristoj, tiel ke unu tereno de la origina unueco, nome la lernejo, evoluis pli kaj pli kaj diferenciĝis per plivastiĝo de la lernenhavoj kaj sistema planado de lernprocedoj.

Per tio la lernejo ricevis krom la integriga funkcio ankaŭ la kvalifikan. Aliflanke la junularhelpo pli kaj pli alprenis la staton de fakultativa, subtena institucio, kiu ĉefe tiam aktualis, kiam montriĝis difektoj en la socialiĝo. La diferenciĝo kaj disiĝo fine atingis tian gradon, ke la lernejo rigardis sia ĉefa tasko la kvalifikadon kaj selektadon. Aliflanke, la sociala apogfunkcio tute malkreskis. La rolo de la instruisto ŝanĝiĝis ĉefe de edukisto al scio-peranto.

La pedagogiaj reformmovadoj komence de nia jarcento intencis kontraŭefiki al tiu ne plu eltenebla situacio, kaj eliris unuavice ne de la forta partnero, la lernejo, sed de la malpli forta, la junularhelpo, kiu trovis novan memdifinon. Junularhelpo estu ne nur edukhelpo en kazo de neceso, sed laŭregula edukinstanco apud lernejo kaj familio. Tiun novan komprenon de la koncepto oni pravigis per tio, ke la evoluo de baldaŭ ĉiuj adoleskantoj estas minacata kaj difektata en nia povum-socio, kio estas rekonebla laŭ la perdo de superrigardebla kaj komprenebla ordo en la profesia kaj labora vivo, laŭ la anonimeco de la grandurbano, laŭ la forfluganta preteco kaj kapablo al kontaktoj, laŭ la dependeco de la influoj el la ekstera mondo, mallonge, laŭ timo, necerteco kaj misorientiĝo.

Tamen oni restis ĉe la disigiteco inter lernejo kaj junularhelpo ankaŭ plue. La normala lernejo plue zorgis pri kvalifikado kaj selektado. Junularhelpo rigardis sia laborkampo la edukfunkcion, ĉefe en aparte gravaj kaŭzoj.

Ekde la sepdekaj jaroj oni klopodas ebenigi la vojon de kunlaboro por ambaŭ edukaj kampoj per pli kritika sinteno kontraŭ la lernejo. La reformitan lernejon oni povus per kelkaj titolvortoj karakterizi kiel: regata de sociaj interesoj, direktata al kognitiva perado de scio antaŭselektita; dotita per regada kaj aŭtoritata pozicio; selektopremo kaj povumpremo; socialpedagogia blindeco.



Konkurado en la klaso
Desegno de 13-jara DETRE Zaránd, el *FOKUSO* 88/2.

Aliflanke la junularhelpon, sub kiu oni komprenas nur la eksterlernejan junularlaboron, oni povus karakterizi per: libervolo en la partoprenado; flekseb-leco en la strukturoj, formoj kaj metodoj, memdecideco kaj samtempe senpotenceco. Sur la bazo de tiu ĉi nova konscio, ke la lernejo ĝis nun ne povis plenumi sian komision eduki al memstareco kaj socia lernado, kaj ke la junularhelpo estas same grava edukkampo, estas eble ekdiskuti pri diversaj dispozicioj rilate al kunlaboro de ambaŭ partneroj en la eduka kampo.

3. Hodiaŭaj lernejo-situacioj kiel provokado al la socialpedagogio

Se oni retrorigardas al la relative longa historio de la disevoluo inter lernejo kaj socialpedagogio (tiu ĉi lasta estis premata pli kaj pli al la periferio de la ĝenerala intereso kaj malpli bone dotita materie, personare kaj finance ol la pligrandiĝanta lerneja sistemo), tiam oni povas sufiĉe miri pri tio, kiom la socialpedagogio sciis engaĝi sin kaj veki publikan atenton kaj intereson.

Ni nun volas priskribi kelkajn aspektojn, kiuj helpas klarigi la kreskantan interesiĝon kaj la energiajn postulojn al kunlaboro. Unue estas la lernejoj mem, kiuj petas diversajn helpojn kaj flankajn servojn de la socialpedagogio, kiel ekzemple psikologian konsultiĝon, helpon en unuopaj kazoj, terapian traktadon, reintegriĝon de sociale difektitaj infanoj. La cirkonstancoj en la ler-

nejoj, ĉefe en la lernejoj por la malpli inteligentaj infanoj kaj en la planataj tutecaj kaj tuttagaj lernejoj ne estas sole kulpaj pri la fenomenoj de lerneja timo, nelaboremo, sintenaj difektoj, alkoholismo, drogo-misuzo, junular-krimeco, sinmortigo. Ili estas supozeble sekvoj ankaŭ de povumpremo, trotakso de kognitivaj povoj kaj konkurenc-strebado.

Multaj lernantoj ofte ne kapablas bone okupi sin dum sia libertempo, ĉu pro neinformiteco pri libertempaj ofertoj, ĉu pro neinteresiĝo, pro nekontaktemo aŭ pro aliaj kaŭzoj.

Flanke de la junularhelpo oni povus ellabori pri tiu punkto jenajn aspektojn:

● *Politik-ekonomiaj kaŭzoj*

Sub tio ni komprenas, ke la lerneja sociallaboro akceptu tiujn lernantojn, kiuj elfalas el la lerneja sistemo, kaj ke ĝi i.a. malhelpu, ke per krimuliĝo de la junuloj ekestu pli grandaj sociaj problemoj.

Iom provoke ni povas esprimi tion jene: junulara sociallaboro kiel jam funkcianta, do ankaŭ financita institucio, forigu la simptomojn kaj malfacilaĵojn, kiuj aperis pro la ne sufiĉe bonaj realigeblecoj de la reform-entreprenoj. Laŭ la opinio de la koncernaj instancoj tiuj projektoj ne kostas tiom, ĉar ili helpas ŝpari la fakte necesajn reformojn en la klerigado de la instruistoj kaj la novformigadon de la instruado.

● *Tuttaga lernejo kiel minacado de la malferma junularlaboro*

La junularhelpaj asocioj rigardas tuttagajn lernejojn kaj la plilongigon de la lerneja tago parte kiel minacon al la eksterlerneja infana kaj junulara prizorgado, ĉar en tiu kazo eksterlernejaj institucioj kaj ofertoj ne plu estus bezonataj. Estas do en la intereso de la pluekzistado de tiuj institucioj kaj por havi sekurajn laborlokojn en la sociallaboro, ke oni klopodas engaĝi sin pli forte en la lernejo.

● *Emancipiĝo de la junularhelpo (la paneohelpo de la socio)*

La trian aspekton oni rigardu paralele kaj en alterna dependeco al la dua aspekto. Se la sociallaboro ne volas perdiĝi kiel subsekcio de la lernejo (en kazo de pli forta engaĝiĝo en la kunlaboro kun la lernejo) kaj perdi sian aŭtonomion, ĝi devas mem emancipiĝi, kaj ĝi devas unue difini sin akre limigite kontraste al la lernejo.

4.Junularhelpo kaj lernejo

Komuna supera celo kaj de la junularhelpo kaj de la lerneja sociallaboro estas, subteni la evoluon de la junaj homoj por ilia propra bonfarto kaj por la bonfarto de la socio laŭ siaj maksimumaj fortoj kaj eblecoj.

En la sekvaj alineoj ni rigardu pli detale taskojn, celojn, eblajn kaj konkretajn laborkampojn de la unuopaj pritemataj terenoj.

Laŭ la plej ĝenerala difino – kiel proksimume Gertrud BÄUMER formulis ĝin – socialpedagogio estas ĉio, kio estas edukado, sed ne lernejo kaj ne familio.

Ene de tiu vasta kampo oni povas diferenci inter tri evoluperiodoj kun diversaj fokusoj, kiel BURKARD trafe konstatas.

La unua evoluperiodo situas en la dudekaj jaroj de nia jarcento. Ni povus nomi ĝin la ŝtatcivitaneca periodo aŭ kiel NATORP diris, la socialpedagogia periodo. Ĝian programon ni povus resumi en la frazo: edukado por la socio, al la socio, per la socio, kaj, en ĝi, edukado de la socio mem. Ĉefe oni interesiĝis pri la ĝenerala socia bonfarto.

Dum la dua periodo oni formulis la klasikan nocion de la socialpedagogio tiel, ke ĝia celo estis korpe kaj mense integra, vigla, valoriganta kaj kreanta homa socio. En la centro de tiu dispozicio troviĝas la individuo, kiun oni venigu al la plena disvolviĝo de liaj spiritaj fortoj kaj al kontrolo de lia impulso-sistemo. La vojo por atingi tion estis preventa pedagogia laboro, junular-flegado, savado de mizeruloj, edukado en edukaj hejmoj.

La sociologia periodo de la socialpedagogio, komencita en 1945 i.a. de FURCK, diferencas laŭ malferma kaj ferma junularhelpo. Ĝin movis la ideo garantii al ĉiuj junuloj la antaŭkondiĉojn al normala disvolviĝo, al formado de morala fundamento por la vivo kaj al natura enkreskiĝo en la vivoformojn de la socio.

Interne de la multnombraj institucioj oni povas diferencigi laŭ libertempohelpo, helpo por memklerigado, helpo trovi profesion kaj plenumi ĝin, helpoj por saneco.

Laŭ FURCK la junularhelpo prezentiĝas kiel dinamisma edukkampo, kiu volas oferti aĝkonforman, eksterlernejan, ne-endanĝerigitan evolu- kaj edukkampon por junaj homoj kiel helpilon por la integriĝo en kaj por la socio.

Tiu ĉi lasta priskribo tre forte alproksimiĝas al la hodiaŭa situacio de sociallaboro kiel socia povumsistemo kun specifaj socialpedagogiaj klerigaj kaj edukaj taskoj. Tiu taskaro estus diferencigenda laŭ:

– individua tasko-dispozicio, t.e. ekvilibrigo de evoludifektoj kaj laŭebla forigo de la koncernaj kaŭzoj;

– laŭplana tasko-dispozicio, t.e. defendo de la interesoj de adoleskantoj en la medioformado;

– socialeduka tasko-dispozicio, t.e. oferti institucionjn por la emancipiĝo kaj socialiĝo de adoleskantoj.

Resume oni povus skizi la taskaron de socialpedagogio per la jenaj titolvortoj: lernado kun akompana aktiveco, malstreĉado, ludado, sportado, socieeta vivo. La sekva komparo inter lernejo kaj socialpedagogio en metodoj kaj celoj montru, en kiu maniero la socialpedagogio plenumas tiun ĉi taskaron kaj kiujn avantaĝojn ĝi havas kompare al la lernejo.


La centra tasko de la lernejo estas la instruado. Iom unuflanke esprimite tio povus esti: garantii al la sekvantaj generacioj la stokojn de kulturaj kaj civilizaj konoj kaj kapabloj/rutinaĵoj, por ke tiuj stokoj povu esti reproduktataj kaj pluevoluantaj en la daŭro de la tempo.

Lerneja sociallaboro el la vidpunkto de la lernejo zorgu por pli da viv-kvalito de la lernantoj, t.e. kompensado por la monotoneco de la lerneja ĉiutago, unuflanka streĉo, tropostulado, manko de movo, mankanta subteno de spontaneeco kaj kreiveco. Krome ĝi helpu en la direkto de socialpedagogia plukvalifikado de la instruistoj. Ĝi do helpu atingi la pedagogiajn kapablojn, kiujn oni ne akiris dum la studado-tempo. Fine ĝi estu ankaŭ estonte la kolektejo por tiuj lernantoj, kiuj laŭ la disponeblaj eblecoj de la instruistoj ne estas integrigeblaj en la instruadon aŭ kiuj simple ne volas lerni.

Iom leĝere ni povus diri, ke la socialpedagogio estu jungata antaŭ la ĉaron de la lernejo, ĝi estu profitata de la lernejo, ĝi servu por kamufli la erarojn en la lernejo-sistemo.

Sed la socialpedagogio mem imagas sian laboron multe pli aŭtonome. Kiel laborkampon ĝi donas al si la profilakton, t.e. la preventadon de tiuj difektoj ĉe la junuloj, kiujn ĝis nun ĝi povis nur sanigi.

Krome ĝi volas kunlabori rekte en la aŭtonomio kaj memdecido kaj la sper-



Desegno de 13-jara DETRE Zaránd , el *FOKUSO* 87/3.

to-eblecoj de la lernentoj, ĉar la instruisto pro sia duobla mandato, nome ŝtatoficisto kaj pedagogo, ne povas transpreni vere klaran pozicion por la infanoj.

5.Konceptoj kaj modeloj de lerneja sociallaboro

En la antaŭaj alineoj ni ĉiam denove akcentis la neceson kaj dezirindecon de kunlaboro inter ambaŭ edukaj terenoj. En la sekvaj alineoj ni nun prezentas tri modelojn, kiuj diferencas en la intenseco de la kunlaboro.

5.1 La distanc-modelo

Por tiu ĉi modelo pledas tiuj, kiuj timas, ke la malforta partnero, la socialpedagogio komplete perdos sian aŭtonomion kaj do ankaŭ la financajn kaj personarajn rimedojn, kaj ke tion transprenos la lernejo. En la kadro de bona povum-diferenciĝo ĉiu partnero devus agi kaj resti laŭeble tie, kie ĝi havas siajn specialajn kompetentojn. Do, la postulo por la junularhelpo estas, ke ĝi devas fari ĉion, por ke la infanoj pro la mankanta socialiĝo en la antaŭlerneja aĝo ne restu lernej-nekapablaj. Lerneja sociallaboro laŭ tiu ĉi koncepto do estas limigita komplete al la antaŭlerneja aĝo, t.e. infanvartejo, (antaŭlerneja) infanĝardeno, infangrupoj. La postulon por la lernejo oni povus priskribi tiel, ke oni ne trudu eviteblajn ŝarĝojn al la lernantoj kaj ke la junularhelpo do ne devas esti petata helpi. La bazo de tiu ĉi koncepto estu forta konscio por la komuna respondeco pri la koncernaj infanoj kaj junuloj. La kunlaboro, kiu fakte tute ne ekzistas ĉi tie, konsistas nur en la reciproka retrokuplo kaj en informoj, ke la lernejo devas konsideri eksterlernejajn rilatojn de la lernantoj pli multe ol nun.

Tiu ĉi modelo fakte povas subteni nur plian disigitecon, kaj ĝi helpas stabiligi la samrangan aŭtonomion en limigita kampo. Tiu ĉi modelo malpli helpas la lernantojn, kiuj ja profitas el la kunlaboro, sed ĝi plue konservas la ĝisnunajn sulkojn de la reciproka burokratia limigo kaj plifortigas ilin.

5.2 La kooperativa modelo

Tiu ĉi modelo similas al la unua en tiu senco, ke la povumoj, la eblecoj kaj la taskoj de ambaŭ terenoj estas pesitaj kaj la koncernaj povumoj estas alordigataj al unu el la terenoj. Kiel ni diris jam ĉe la distancmodelo, tiu ĉi modelo estas tre teoria kaj en la nuntempa alarmiga situacio de la lernantoj ne ĉiam adekvata kaj helpa.

5.3 La integrativa modelo

La celo de tiu ĉi dispozicio estas ŝanĝi la lernejan socialiĝon helpe de socialpedagogie klerigitaj fakuloj kaj socialpedagogiaj ofertoj kaj metodoj. Tiun ĉi plej sukces-promesan modelon oni povas realigi kompreneble nur en etapoj. La unua ŝtupo povus esti la reciproka informado. La nigraj tabuloj en la lernejoj enhavu ankaŭ libertempo-ofertojn de la najbaraj libertempohejmoj, adresojn de junularaj asocioj kaj edukkonsultejoj, publikaĵojn kiel lernejan aŭ grupan gazeton, invitojn al aranĝoj ktp. Mallonge: oferti ĉiujn informojn, kiuj povus interesi la junulojn en la socialpedagogia tereno.

Ni jam diris en alia loko, ke la junuloj ofte tute ne estas informitaj, kiuj libertempaj okupoj ekzistas en ilia proksimeco. La tabuloj instigas al vizitado de tiu aŭ alia okazaĵo kaj interesas la junulojn eble por pli longa tempo, se la instruisto rekomendas kelkajn okazaĵojn aŭ persone vizitas la koncernan ejon.

Tiu estas dua ŝtupo, priskribebla kiel politiko de la malfermita pordo. Sub tio ni komprenas, ke la instruistoj vizitu la libertempo-hejmojn, por ke ili studu tie i.a. la libertempan sintenon de la koncernaj infanoj kaj por ke ili povu paroli kun la tiea edukisto kiel pedagogia partnero. Tio montriĝas ankaŭ en la

komuna uzado kaj utiligado de la koncernaj ejoj kaj iloj, t.e. la gimnastika halo posttagmeze por sportgrupoj en la libertempa hejmo, la „hobio-kelo" de ĉilasta por la manlabora kaj desegna instruado de la lernejo. Oni multe pli bone utiligus la multnombrajn, kutime ne plene utiligatajn ilojn. Antaŭkondiĉo por tio estas la persona engaĝiĝo de instruistoj kaj edukistoj kaj la forŝovado de „ŝtato-pensado". Ĉe tiu modelo fakte kaj la lernejo kaj la socialpedagogio devus profiti. Ĉi tie la lernejo ne perdas sian sendependecon, sed ja parton de sia orgojlo kaj de la privilegia pozicio de ĝia pedagogio. Anstataŭe ĝi estos pli proksima al la reala vivo denove kaj ĝi povos plenumi pli bone siajn du samrangajn taskojn, nome kvalifikadon kaj integrigon, t.e. scioperadon kaj socian edukadon. Kaj per tio ĝi helpas venki la malsanojn, parte de ĝi mem kaŭzitajn: lernejan timon kaj trostreĉitecon, frustriĝon, sinteno-difektojn, konkurenco-pensadon. Per la enkonduko de direktita pasigo de libertempo la socialpedagogio ricevus pli altan reputacion kaj novan agadkampon. Ankaŭ ĝi havus la eblon, atingi laŭeble ĉiujn gejunulojn kaj infanojn per sia ofertaro, plivastigi tiujn ofertojn, labori prevente kaj celkonscie ĉe la bazo, t.e. kaj en la lernejo-sistemo mem kaj ankaŭ ĉe la celgrupoj.

6. Ekzemploj pri praktika kunlaboro

La cititaj ekzemploj de praktikata partnereco inter sociallaboro kaj lernejo malsamas en la grado de integriĝo, kaj ili iomete montras siajn problemojn kaj ankaŭ sukcesajn solvojn, kiuj povas en certa maniero esti ankaŭ reprezentaj.

6.1 La modelo *Junularsocia laboro kaj tuttaga lernejo* en urbo Kiel

Tiun ĉi modelon oni iniciatis en 1975, kaj oni limigis ĝin al du jaroj. La projekto estis en la manoj de junularasocioj: sindikata, evangelia, ruĝkruca kaj sporta asocioj. Sed, ĉar oni ne alstrebis integrigon en la lernejon, oni konservis sufiĉe grandan distancon, tiel ke estis relative malgranda la influo al lernejaj strukturoj. En la laboro oni akcentis la terenon de libertempo, tamen la projekto fiaskis pro malalta partopreno de la lernantoj.

6.2 Modelprojekto *Lerneja sociallaboro en la integrita tuteca lernejo* de Kassel-Waldau

Ĉe tiu modelo oni decidiĝis por la vojo *Kritika integrigo de lerneja sociallaboro en la lernejo*. Tio i.a. montriĝis per tio, ke instruistoj kaj sociallaborantoj kunlaboris kiel samrajtaj partneroj. La laborkampoj de la sociallaboro unuflanke estas la posttagmeza prizorgado de lernantoj el la 5–a ĝis 7–a klasoj, t.e. hejmtaska helpo kaj libertempaj ofertoj kun la celo subteni la kreivecon, socian lernadon kaj peri novajn sintenmanierojn. La alia ĉefpunkto estas la konsultado kaj pliklerigo, kaj de la instruistoj kaj de la infanoj malfortaj en la laboro kaj sintenodifektaj.

Instruado, prizorgado kaj konsultado ĉi tie do estas sufiĉe interligitaj unu kun la alia, tiel ke oni povas interŝanĝi reciproke spertojn kaj rezultojn. La konsultado kaj subtenado integrita en la lernejon perdas per tio ankaŭ la aspekton de io neĝojiga, aparta, evitinda (oni ja ofte malŝatas iri al ekstera konsultejo). Aliflanke la socialpedagogo havas la eblon interkonatiĝi kun sia celgrupo pli precize, li povas pli detale konsideri iliajn dezirojn kaj bezonojn, kaj li povas utiligi pli bone la ekzistantajn eblojn, ilojn kaj ejojn por sia laboro.

6.3 Modelprojekto *Sociallaboro en la lernejo* ĉe la „tuteca" Ernst-Reuter-lernejo en Frankfurto

Supera celo de tiu ĉi projekto estis subteni la socian lernadon kiel esencan komponenton de la lerneja klimato, haltigi sintenajn okulfrapaĵojn, malakrigi la kaosan libertempo-situacion per konkretaj ofertoj en la kadro de la libertempo-pedagogio. La detalaj celoj tiam estis:

- la plialtigo de la sento pri propra valoro ĉe lernantoj, gepatroj kaj instruistoj. Sub tio oni komprenu, ke oni kontaktigu lernejon kaj aliajn edukkampojn kiel ekz-e la gepatrojn aŭ ludgrupojn, kaj oni solvu komune kaj aktive la edukproblemojn. Al tiuj laboroj apartenas gepatra laboro, gepatra konsultado, okupiĝo pri la problemoj de ĉiu infano.
- donado de orientigitaj helpoj. Kiel ankaŭ en aliaj terenoj, la lernejo devas konsulti la gepatrojn pri la edukado, ĝi devas fiksi komunan edukstrategion, konsili la lernantojn laŭ iliaj emoj kaj kapabloj al certa profesia vojo, helpi unuopajn lernantojn en konkretaj problemoj. Per la integrigo de tiu konsilada laboro en konsiladcentron, kiel oni kreis ĝin en tiu ĉi projekto, oni povas apliki samtempe plurajn konsiladservojn kaj terapiojn, kaj ekzistas komunikado inter lernejo kaj la aliaj edukkampoj.
- evoluigo de la kapablo de ambaŭflanka toleremo kaj de pli alta frustriĝotoleremo. Ni jam atentigis pri junulara suicido, krimemo, drogomisuzo, frustriĝo kaj misorientiĝo. Per celkonscia terapio unuopa kaj grupa, per interesa libertempo-oferto, per rilateblaj personoj kaj per la kunlaboro inter instruistoj, socialpedagogoj kaj gepatroj, sentebla ankaŭ por la lernantoj, la lernantoj povas denove lerni la kontaktiĝon kaj diskutadon kun aliaj homoj kaj ideoj. Aliflanke ili ricevos pli altan memkonscion, kaj pro tio ili malpli facile retiriĝos en izoliĝon per silentado, drogoj aŭ krimbandoj.
- evoluigo de kapablo de sinteno kompromisema kaj kunlaborema. En tiu ĉi konkreta projekto tiuj certe atingindaj celoj malsukcesis pro malbona organizado de celoj, ĉambroj, personaraj kaj financaj antaŭkondiĉoj, pro malbona interkonsento rilate kompetentecojn, kaj fine pro la tempopremo, ĉar la projekto daŭris nur mallonge.

Tamen, estas interesa la disdivido en tri centrojn, nome en lernantocentro, konsiladcentro kaj *alparola ejo* – kompreneble nur, se ili kunlaboras. Aparte la *alparola ejo* meritas nian atenton. Tiu *alparolstacio* donas al la celgrupoj laŭ ilia aĝo multfacetan lud-oferton dum la lernejaj paŭzoj, klasobservadon, partoprenon en eksterlernejaj aktivecoj, t.e. ekskursoj, vizito al teatroj k.s. Aparte la retenemaj lernantoj trovis en tiu tereno personon por kontakti.

6.4 Taga internulejo en Munkeno

En tiu ĉi projekto la integriĝo ŝajne sukcesis plej bone. Ŝtataj instruistoj, urbaj fakinstruistoj kaj edukistoj aperis en la internulejo ekskluzive sub la nomo *edukisto*. Same oni intergrigis patrinojn kaj patrojn per laboro en la kuirejo aŭ ĉe riparadoj partnerece en la edukkampon, tiel ke ne povis veni iuj tensioj, kiuj kutime ekestas pro *statuso-pensado*.

Metodoj kaj eblecoj de la lernejo kaj socialpedagogio estas miksite praktikataj. Alvenas la socialpedagogiaj edukistoj al la ekzercaj lecionoj, alvenas la instruistoj-edukistoj al la posttagmezaj aktivecoj, tiel ke instruado kaj libertempaj aktivecoj ne estas strikte disigitaj, sed ili harmonie transiras de unu al alia, kion oni karakterizas kiel adaptadon al la infana tagritmo. Escepte ĉe la devigaj lecionoj oni trarompas la aĝo-barilojn, la pliaĝuloj – tute ne devige – kunlaboras kun la malpliaĝuloj, ĉio estas socia lernado. Kiel apartan atingaĵon oni akcentas, ke la taga internulejo pliriĉigas la familian edukadon per ĉiuspeca motivigo, ĝi senŝarĝigas familian edukadon de edukfunkcioj dum la labortagoj en la semajno, kaj ĝi permesas al la familio senĝenan kunestadon dum la semajnfino. Tamen, tiujn ĉi lastajn eldirojn oni ne prijuĝu tro pozitive, ĉar oni devas vidi la danĝeron, ke oni forprenas de la familio ĝian eduktaskon kaj deklasigas ĝin al libertempo-familio. Sed pri tiu problemaro nur marĝene.

7. Finaj rimarkoj

Kiel montris la pli-malpli sukcesintaj projektoj, eblas kun bona volo, favora organizado, sufiĉaj tempo kaj subtenado, ke lernejo kaj socialpedagogio estu integrigitaj al la lerneja sociallaboro en tia formo, ke lernantoj, lernejsistemo, junularhelpo, gepatroj kaj nelaste la socio povu profiti el tio. Tiujn projektojn oni plejparte organizis en *tutecaj* aŭ en tuttagaj lernejoj, ĉar tie la misorientiĝo de la lernantoj estas aparte granda kaj la negativaj sekvoj aparte klare aperas. Krome la pli alta nombro de lernantoj kaj la ofte ekzistantaj multnombraj ejoj plifaciligas tiujn projektojn. Ankaŭ se tiel intensa kunlaboro ne ĉie eblas, oni tamen klopodu atingi la komencajn stadiojn. Tiu signifas, ke oni intimiĝu kun la koncernaj labormetodoj, celoj, ejoj, kaj ofertoj, oni estu reciproke informata, oni partnerece estimu unu la alian, kaj oni komune uzu la disponeblajn rimedojn, ilaron, ejojn. Tio signifas por la instruisto, ke li vizitu la libertempan hejmon en la proksimeco, ke tie li observu la gelernantojn, ke li kontaktu ilin kaj parolu kun ili – liberigita de la prema lerneja atmosfero. Tio signifas ankaŭ, ke la instruisto estu informita pri la agadoj kaj eblecoj de la socialpedagogoj, de la antaŭlerneja edukistino kaj de la infanvartistino aŭ infanĝardenistino.

Krome la instruisto utiligu la konsilad-oferton de la socialpedagogio. Li aktivu prevente, kaj li ne forŝovu senesperigajn kazojn.

Tamen, la instruisto ne neglektu siajn edukajn taskojn, t.e. la subtenadon kaj integrigon de la unuopa lernanto nur pro tio, ke ekzistas tiaj institucioj. La socialpedagogion oni taksu kiel samrajtan partneron, kaj la ĝenerala publiko,

la lernantoj, gepatroj, instruistoj interkonatiĝu kun ĝi, kun ĝiaj taskoj kaj eblecoj.

Malgraŭ ĉiuj bonintencaj reformstrebadoj devas kontraŭstari la lernantoj, instruistoj, gepatroj kaj socialpedagogoj troan prilernejan okupiĝon kaj forprenadon de la libertempo. Por ke juna homo fariĝu li mem, por ke li kapablu decidi, memstari kaj responsi, oni ne rajtas lasi lin tro longe en la lernejo, kaj oni ne forprenu de li la tutan libertempon, ĉar – kiel ĉio alia totale fiksita – tio bremsus la elformiĝon de lia personeco.

Malgraŭ ĉiu kunlaboremo oni bone pripensu ĉiun novan reformon, kiel ni jam aludis ĉe la deklasiĝo de la familio al libertempo-familio, kaj oni zorge pripensu ĉion, por ne veni en novan dilemon. Supera ordono por tiuj ĉi certe subtenindaj eksperimentoj estu: gepatroj, lernejo kaj vere individue libera spaco estu akceptataj kiel samnecesaj. Estus fatale, se la lerneja sociallaboro tiom okupus la infanojn, ke post nelonge oni parolus pri la denove negativaj sekvoj de tiu ĉi reformmovado. Tiam oni eble povus diri, ke oni elpelis la diablon per Belzebubo.

Dr. Norbert SCHIER
H.-Lübke-Straße 19.
D-W-4790 Paderborn 2.

Eŭropa Lernejano

Mi tute aprobas la dirajĵojn de M. MALOVEC (IPR 91/4.) Mi nur bedaŭras, ke ne estis menciita la adreso de tiu Societo de la Infanoj de Eŭropo:

S-ro Michel FEUCHOT
Les Loupiots d'Europe, Bèze
F-21310 Mirebeau
Tel: 80-75 36 95
Germain PIRLOT

INSTRUU TALENTULOJN!!!

La eksperimenta bazlernejo en Budaörs, Hungario denove ekigas klason kun 6-jaruloj, kiuj dum la unua studjaro ellernos Esperanton por poste lerni aliajn studobjektojn en tiu lingvo.

Instruist(in)o pri Esperanto tutmonde serĉata. Pliaj informoj kaj sinpropono ĉe Fondaĵo Talento, Budaörs, Pf. 102, H-2041. Tel: (36-1) 173-3454.

Aperis

interesa dosiero pri Esperanto – temas pri kolektiva laboro – en la suplementa numero de *Le Nouvel Educateur* kun la titolo: *Le droit à la communication par l'espéranto* (La rajto je komunikado per Esperanto)

La bele presita libreto, kolorbilde kovrita, prezentas la historion de Esperanto en la Freinet-movado.


Haveblas kontraŭ 10 FF (inkl. de la sendokostoj) ĉe:
ICEM-ESPERANTO
Henri MENARD
F-44330 Le Pallet
Pĉk: ICEM-ESPERANTO
Nantes 2224-93 Z.

INSTRUPRAKTIKO

INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO

Tiu ĉi tasketo fontas de la jaro 1989. el revuo *Bonvenon, Amiko!* iniciatita de Kaliforniaj bazlernejanoj. Ilia klubo jam de tiu tempo celas helpi al infanaj grupoj interkomuniki kaj lerni unu de la alia, proponi kaj interŝanĝi diversajn malmultekostajn instruilojn. La ok-landa korespondado de la klaso fruktis la alian libreton, *Ni esploru la mondon!*, kiu prezentas la flagojn, riverojn, bestojn ktp. de iliaj leteramikoj en Britio, Ĉeĥio-Slovakio, Ĉinio, Finnlando, Francio, Litovio, Pollando kaj Usono.

Jen bela papilio. Kolorigu ĝin!



1 = ruĝa 4 = oranĝa
2 = flava 5 = blanka
3 = verda 6 = blua
7 = purpura

Matuo AMADOR

En 1992 *Infanoj ĉirkaŭ la mondo* proponas novan lernigan ludon: **MONDO–RONDO.** Same kiel sur sia simbolo infanoj ĉie ĉirkaŭ la mondo mantenas sin, tiel la leteroj de la Mondo-Rondanoj povus formi unu grandiozan tutmondan brakumon.

Kiel partopreni? Unue: infangrupo *kune* verku du-tri mallongajn frazojn pri interesa bildkarto, aŭ pri la geografio, bestoj, moroj, popoloj ktp. de sia lando. Se la teksto bezonas korekton aŭ Esperantan tradukon, vi kiu legas la artikolon, helpu ilin pri tio. Due: *infano* kopiu la Esperantajn frazojn klare kaj facile legeble sur la bildkarton. Trie: Sendu la bildkarton al partoprenanto de la ludo. Por esti listigita kaj ricevi la aktualan liston de ok el la aliaj partoprenantoj, la grupo sendu tian bildkarton al:

Esperanto-Klubo, Freese Elementary School
8140 Greenlawn Drive, San Diego, CA 92114 USA

Pri la temo v. ankaŭ artikolon en *Esperanto* 1992.jan.

LINGVISTIKO

RETROSPEKTIVA RAKONTADO KAJ PLUSKVAMPERFEKTO EN LA ZAMENHOFA LINGVO

Odd TANGERUD (Norvegio)

Kial Zamenhof uzas pluskvamperfektan formon por esprimi ion, kio similas al ordinara preterito? La respondo estas, ke tiuj formoj ne estas ordinaraj preteritoj, ĉar ili ne akcentas la tempon de la prepozicio. Estas aliaj aferoj, kiuj pli gravas ol la tempo, kaj tio estas iu aspekta stato en la verboj kaj en la rilatoj inter la frazpartoj reciproke. Zamenhof uzis la paradigmon de paragrafo 6 por esprimi la tempajn rilatojn, sed li ankaŭ profitis de la ebleco uzi la pluskvamperfektan formon por esprimi aspektojn, kiuj ne klare esprimiĝus per la simpla preterito.

Necese estas doni profundan analizon de kelkaj frazoj, kaj mi ne restriktas min al amputitaj citaĵoj:

„Jes!" li diris, „kaj tie en tiu angulo staris tino por akvo; tie naĝadis mia boato, kiun mi mem al mi skulptis. Kiel bone ĝi velveturis! Cetere mi baldaŭ devis lerni la velveturadon en alia maniero!"

„Antaŭe ni iradis en la lernejo kaj iom lernis!" ŝi diris, „kaj poste ni estis konfirmitaj. Ni ambaŭ ploris; sed posttagmeze ni mano en mano supreniris la rondan turon kaj superrigardis Kopenhagon kaj la maron." (Fab. II, 78)

Zamenhof profitis de la gramatikaj eblecoj, kiujn li mem kreis permesante al la finaĵo -is ludi rolon kiel preteriton imperfektan, preteriton perfektan kaj antaŭpreteriton. Ekzemplo estas, ke en la originalo staras „jeg havde selv skaaret det". *Havde skaaret* estas pluskvamperfekto, kiun Zamenhof tradukis per skulptis. La esprimoj „li diris" kaj „ŝi diris" lokas la rakonton en la pasinta tempo, kaj ĉiuj aliaj verboj estas antaŭtempaj al ili, ankaŭ „ni est*is konfirmitaj*, rekta traduko de la originalo, kaj kiu formo estas pasinttempa al la fabelo. Ni povas fari demandon pri la frazo: „Kiaj estis ni?" La memevidenta respondo al tiu adjektiva demando estas: „Ni estis konfirmitaj". Estas grave noti, ke la rakonto estas retrospektiva, kun apartaj postuloj al la uzo de formoj de la verboj. Ne estas la ago konfirmi en la esprimo, sed la vizio de la du gemaljunuloj pri ili mem en la pasinteco, kie ili staras en stato de konfirmiteco.

Zamenhof uzas pluskvamperfekton por esprimi la aspekton, nome la staton al kiu la du gemaljunuloj retrorigardas. Tio estas psikologia afero, kiu ne bezonas iun rearanĝon de la paradigmo de Zamenhof.

„Jes, ili brilas", diris Karen (pri la ŝuoj), kaj ili montriĝis laŭmezuraj kaj estis aĉetitaj; sed la maljuna virino ne sciis, ke ili estas ruĝaj, ĉar neniam ŝi per-

mesus al Karen iri al konfirmo kun ruĝaj ŝuoj, sed nun ŝi permesis. (Fab. II, 99.)

La dana originalo:

«„Ja, de skinne! sagde Karen; og de passede, og de bleve kjøpte; men den gamle Frue vidste ikke af, at de vare røde, thi hun havde aldrig tilladt Karen at gaa til Konfirmation med røde Sko, men det gjorde hun nu.»

La frazo estas bona ekzemplo pri la analizo de tradukota frazo, kiun Zamenhof havis antaŭ si. La ĉefa psikologie grava sceno estas la momento, kiam Karen staras tie kun la ŝuoj sur la piedoj, ĝojplena kaj feliĉa. Ĉio alia estas pasinttempa al tiu momento. La verboj „diris", „montriĝis" kaj „estis aĉetitaj" indikas tri sinsekvajn tempopunktojn. Per la lasta el tiuj tri verboj Zamenhof indikas la fakton, ke Karen staras kun la ŝuoj sur siaj piedoj post la aĉetado. Sekve li tradukas: **„ili ... estis aĉetitaj"**. La kunmetita formo de la verbo montras pasintan, finitan agon. Alia verboformo ne konvenus, ĉar ne temas pri la momento kiam okazis la ago (ŝi aĉetis),kaj ne temas pri la ago mem (ŝi estis aĉetanta), sed pri retrospektivo al kio estis okazinta. La esprimoj „ili montriĝis laŭmezuraj" „kaj estis aĉetitaj" estas paralelaj. Ni estus povintaj diri: „ili estis laŭmezuraj", kaj neniu parolus pri pluskvamperfekto, ĉar estas nur adjektivo kiel predikativo al subjekto. Same pri „estis aĉetitaj". En la frazo „la maljuna virino ne sciis, ke ili estas ruĝaj" la esprimo **ne sciis** estas antaŭpasinta al la tuta sceno. La saman uzon de kunmetita verbo ni trovas en frazo iom antaŭe en la rakonto.

„La riĉa ŝuisto en la urbo prenis mezuron por ŝia malgranda piedo. Tio estis farita en lia domo."

La esprimo estis farita montras, ke temas pri antaŭpasinteca ago, kaj la verbo **prenis** en la antaŭa propozicio sekve havas antaŭpasintecan (pluskvamperfektan) signifon (= estis preninta), kio estas uzado de Zamenhof, kiel ni jam vidis. Ke temas pri retrospektiva rigardo al la aĉetado de la ŝuoj, tio estas substrekata de la lastaj vortoj, „sed nun ŝi permesis", kaj al tiu esprimo la antaŭa rakonto estas tempe subordigita.

Ni havas ĉi tie ekzemplon pri la elasta uzo de la verba paradigmo en Esperanto fare de Zamenhof. La paradigmo facile fleksiĝas laŭ la psikologia enhavo. Ekzemple -is povas signifi preteriton, antaŭprezencon kaj pluskvamperfekton. Simile ankaŭ pri **estis -ita**. Ĝi estas la Esperanta ebleco esprimi la pluskvamperfekton de aliaj lingvoj kiam temas pri tempo. Sed en la ĉi tie analizita frazo ne temas pri tempo sed pri la anima stato de la knabino kaj pri la agoj kondukantaj al tiu stato. Do ni havas ekzemplon pri aspekto, nome stato en kiun la knabino estis enkondukita antaŭe al la finaj vortoj „sed nun ŝi permesis".

«„...kiam Phantasus venos, mi certe trovos ian okazon, por elŝiri plumon el liaj flugiloj, vi ĝin prenos, pli bonan ricevis neniu poeto; tiam vi havos sufiĉe!"

Kaj Phantasus venis, plumo estis elŝirita al li, kaj mi ĝin ricevis," rakontis la malgranda muso; „mi devis tamen antaŭe teni ĝin en akvo, ĝis ĝi moliĝis, ĉar ĝi estis ankoraŭ tro malfacile digestebla, mi tamen ĝin formanĝetis."» (Fab. III, 133)

Mi citas ĉi tiun interrompitan citaĵon, ĉar ĝi estas ankaŭ uzita de De Hoog kun la sekvanta frazo kiel sola „analizo": „Ĉu do jam mankis tiu plumo?" Sur tia sola „analizo" li bazis sian opinion pri paradigmo!

La citaĵo estas eltiro el sufiĉe ampleksa retrospektiva rakonto, en kiu la muso prezentas okazaĵojn okazintajn. La ĉefa ideo estas, ke ĝi estis manĝinta formikon por esti saĝa laŭ la eldiro de Salomono; kaj de arbara driado ĝi ricevis helpon por akiri fantazion. Ŝi estis haviginta al ĝi la plumon por ke ĝi ekhavu fantazion kaj fariĝu poeto. La tuta rakonto estas retrorigardo, kaj la tempo estas „historia pasinteco" (se oni povas elekti tian esprimon, ĉar pasinteco estas ja ĉiam historio). La esprimo „estis elŝirita" estas rekta traduko de la originalo. Tiu pluskvamperfekto esprimas faritan agon, do postan staton aŭ aspekton. „Phantasus venis" estas vigla „historia pasinteco". Ĉiuj vidas, ke uzo de pluskvamperfekto tie, estus tre mallerte kaj peze. Fakte estas la lingvo de Zamenhof uzi pluskvamperfekton pri faktaj finitaj agoj en retrospektiva rakonto. Pluskvamperfekto trovas lokon ĉi tie, ĉar rakontanto rakontas tion, kion iu alia antaŭe rakontis. Ni do havas tri ŝtupojn en la rakonto. Tial estas tre grave vidi la rilatojn de la verbaj formoj reciproke. Kaj tial la nocio de la priparolata tempo ludas tian gravan rolon. Kaj diri ke „estis -ita" signifas simplan preteriton kondukas nur al malkompreno.

La unua frazo en la citaĵo estas finita afero, kiu ne influas la duan, ĉar la muso rakontis ion antaŭpasintan.

La propozicio „mi ĝin ricevis" indikas la priparolatan tempon. Antaŭa al ĝi estas la propozicio „plumo estis elŝirita", do antaŭpasinteco. La propozicio „Phantasus venis" estas antaŭa al la elŝiro, do retrospektivo. Jen alia ekzemplo pri la flekseblecо de la lingvo de Zamenhof, kaj tiun flekseblecon li ĉerpas el paragrafo 6 sen ia bezono starigi alian paradigmon.

Mi aldonas alian ekzemplon el la fabeloj de H.C.Andersen, kiun donas Waringhien, kaj kiun ripetas De Hoog. Temas pri botelkolo:

«La maljuna fraŭlino en la subtegmenta ĉambreto povis trovi uzon por ĝi, kaj tial la botelkolo venis supren, estis provizita per korko kaj tiu ĝia parto, kiu antaŭe estis turnita supren, nun estis turnita malsupren, kiel ofte okazas ĉe ŝanĝoj. Ĝi ricevis freŝan akvon kaj estis pendigita antaŭ la kaĝo de la malgranda birdo, kiu tiel laŭte kantis, ke oni aŭdis resonadon.

„Jes, vi povas kanti!" Tion diris la kolo de botelo, kaj ĝi estas ja siaspeca rimarkindaĵo, ĉar ĝi estis estinta en aerostato. Pli oni nenion sciis el ĝia historio. Nun ĝi pendis kiel birdvazeto, ...» (Fab. III, 113)

La lasta propozicio montras, ke estas retrospektiva rakonto, kaj ĝi estas antaŭtempa al la fina eldiro „ĝi pendis", konforme al klarigo 109 en Lingvaj Res-

pondoj. La kvar pasivaj participoj estas antaŭtempaj al la penda stato antaŭ la kaĝo, kion ni komprenas per la posta eldiro de la botelo: „Jes, vi povas kanti!"

La adverboj „antaŭe" kaj „nun" estas partoj de la relativeco, kaj neniel influas la participojn. Tion ni vidas, se ni elektas alian, respondan esprimon: „La supro, kiu estis turnita supren, estis turnita malsupren". Ne elegante, sed tamen la sama senco. La du adverboj nur tempe lokas la du participojn reciproke, ĉar ĉio estu tute klara por la leganto.

Ripete ni vidas, ke Zamenhof flekse uzas preteriton kaj pluskvamperfekton en retrospektiva rakonto.

Mi prenas kelkajn ekzemplojn el la Biblio. Estas ekzemploj, kiujn De Hoog uzis en Sim. p. 99.

„En tiu sama nokto Beltŝacar estis mortigita" (Daniel 5.30)

De Hoog aldonas jenan „analizon": „En tiu nokto oni mortigis lin, li ne jam estis mortigita antaŭe. Tio ja estas evidenta!"

Jen la „analizo" de De Hoog, sur kiu li bazis sian opinion pri uzo de participoj. Al alia ekzemplo li donas la „analizon": „Vidu vian nacian biblion!" Oni devas sin demandi kiom oni akceptu en diskuto pri gramatika scienco?

La rakonto al kiu la citaĵo apartenas, estas jena:

„(18).... Dio la Plejalta donis al via patro Nebukadnecar regnon, potencon, honoron kaj gloron.... (20) Sed kiam lia koro fieriĝis kaj lia spirito malhumiliĝis, li estis deĵetita el sia reĝa trono kaj senigita je sia gloro; (21) kaj li estis elpuŝita el meze de la homoj, kaj lia koro fariĝis simila al koro de besto, kaj li vivis kun sovaĝaj azenoj; ...(22) Vi, lia filo, ho Belŝacar, ne humiligis vian koron, kvankam vi sciis ĉion tion; (23) sed vi levis vin kontraŭ la reganton de la ĉielo, ... kaj Dion, en kies mano estas la spiro de via vivo kaj ĉiuj viaj vojoj, vi ne gloris. (24) Pro tio estas sendita de Li la mano kaj skribita ĉi tiu surskribo. (25).... MENE, MENE, TEKEL, UFARSIN. (26) Jen estas la signifo de la vortoj: MENE: Dio kalkulis la tempon de via reĝado kaj metis al ĝi finon; (27) TEKEL: vi estas pesita sur pesilo kaj trovita tro malpeza; (28) PERES: via regno estas dividita kaj donita al la Medoj kaj Persoj. ... (30) En tiu sama nokto Belŝacar, reĝo de la Ĥaldeoj, estis mortigita. (31) Dario, la Medo, ricevis la regnon, havante la aĝon de sesdek du jaroj."

Vi vidas ke estas retrospektiva rakonto. La prezentado estas antaŭa al la fina eldiro „Dario, la Medo, ricevis la regnon," kaj tiu eldiro estas tiu de la rakontanto de la kroniko, kaj ne tiu de Daniel. Ni havas do kvar ŝtupojn en la ĉapitro: La historiisto; antaŭ li la fino de Belŝacar; antaŭ ĝi la eldiroj de Daniel; antaŭ ili la sorto de Nebukadnecar. Zamenhof flekse lingve ludas per la ŝanĝo inter preterito kaj pluskvamperfekto. „... lia koro fieriĝis kaj lia spirito malhumiliĝis" kaj jen pri io decidita kaj farita „li estis deĵetita el sia reĝa trono kaj senigita je sia gloro". Tiel ankaŭ pri la ceteraj ekzemploj en la citaĵo. La esprimoj kun „estis -ita" donas faktajn decidojn aŭ plenumitajn farojn. Interesa estas la ŝanĝo al „estas -ita" kiam Daniel ĉesas paroli pri Nebukadnecar kaj

komencas rekte paroli al Belŝacar. „Estas" donas la tempon de lia rekta parolo, kaj la „-ita"-participoj donas la decidojn jam faritajn de Dio. Ĉiuj participoj estas adjektivoj. Ne estas loko por iu „-ata", ĉar ĉiuj tiuj decidoj kaj faroj efektiviĝis antaŭ la momento de la fina eldiro: „Dario, ... ricevis la regnon.", kio ja estas logika en historia rakonto.

Similan rezonadon oni povas fari pri la aliaj citaĵoj el la Biblio, kiuj estas prezentitaj en „Simpozio pri -ata/ita" p.99. La citaĵoj ne estas kompletaj, do mi iomete pliĝustigas ilin:

„(16) Ester estis prenita al la reĝo Aĥaŝveroŝ en lian reĝan domon ... (Pasas longa tempo, Ester ekscias pri atenco kontraŭ la reĝo, rakontas pri tio al li.) ... (23) La afero estis esplorita kaj trovita vera, kaj oni pendigis ambaŭ sur arbo. Kaj tio estis enskribita en la kronikon ĉe la reĝo."

La rakonto estas retrospektiva, kaj la verboj estas antaŭtempaj al la fina esprimo „enskribita en la kronikon", kio ja estas tute natura, ĉar la kronikisto ja rerakontas rakonton pri io pasinta.

La paradigmo de la verboj restas tiu donita de Zamenhof en lia 6. paragrafo. Ĝi ordigas la tempajn rilatojn. Por la esprimo de aspektoj, la lingvo profitas de la eblecoj en tiu paradigmo esprimi finitecon, komencitecon, nefinitecon, daŭron, decidojn, statojn. Tio ebliĝas ĉar Zamenhof enkondukis en Esperanton pli grandan nombron de participaj formoj ol ni trovas en aliaj lingvoj.

Odd TANGERUD
N-3300 Hokksund

* * *

Aktoj de la Internacia Lingvistika Kongreso

Kelkajn semajnojn antaŭ la malapero de GDR aperis la ampleksaj trivolumaj aktoj de la 14-a Internacia Kongreso de Lingvistoj, okazinta en 1987 en orienta Berlin: *Proceedings of the Fourteenth International Congres of Linguists* Berlin/GDR, August 10 - August 15, 1987, Berlin, Akademie-Verlag, 1990. vol. I. p. 1–938; vol. II. p. 939–1835; vol. III. p.1836–2818.

La volumegoj entenas kelkajn rezultojn de la aktiva kongresa partopreno de interlingvistoj: germanlingva raporto de D. Blanke, S. Kuznecov kaj R. Lötzsch pri la rondtablo *Interlingvistiko/Planlingvoj* (vol. I.); V. Sadler *From Dictionary to Knowledge Bank* (pri DLT), A. Sakaguchi *Zum Gegenstand der Interlinguistik* (vol. II.); K. Schubert *Vom theorischen Entwurt zur praktischen Entscheidung: das halbautomatische Übersetzungssystem DLT* (vol. III.).

La 15-a Internacia Kongreso de Lingvistoj okazos en 1992 en Kanado. Ĉu ankaŭ ĉifoje partoprenos interlingvistoj?

Detlev BLANKE

INFANOJ TRANS LA LIMOJN!

De persono, kiu volas esti nekonata, la kasisto de ILEI ricevis monsumon por stipendio(j) al partoprenant(in)o de infankongreso aŭ simila aranĝo, kie infanoj de diversaj landoj renkontiĝas kaj per Esperanto amikiĝas. La donacinta persono atentigas pri tio, ke la mono estas akirita per diligenta kaj malfacila laboro kaj simpla vivo.

La lernant(in)o devas esti diligenta kaj en aĝo de lernantoj en la deviga lernejo. La eks-kasisto de ILEI atendas esperantlingvan raporton de la stipendiul(in)o post la partopreno de la infanrenkontiĝo kun respondo je ekzemple jenaj demandoj: Kio okazis dum la kongreseto? Ĉu vi trovis amik(in)on? El kiu lando li (ŝi) estis? Kio plaĉis al vi plej multe? ktp.

La membro-instruist(in)o, kiu deziras peti stipendion por infano en sia kurso, devas respondi jenajn demandojn:

1. En kiu infanrenkontiĝo la infano intencas partopreni? (kiam? kie? aranĝanto? adreso?)
2. Kio estas la nomo, adreso kaj aĝo de la infano?
3. Ĉu la infano bone povas konversacii en Esperanto kun samaĝuloj pri temoj rilatantaj al la infana aĝo? Ĉu la infano estas diligenta kaj ne-riĉa?
4. Kiom kostas la restado en la renkontiĝo?
5. Kiom kostas la vojaĝo (tien kaj reen) al la renkontiĝo? (prefere en svedaj kronoj aŭ germanaj markoj)
6. Ĉu vi promesas sendi esperantlingvan raporton pri la renkontiĝo al la eks-kasisto de ILEI en unu monato post la fino?

La peton pri stipendio bv. sendi minimume tri monatojn antaŭ la komenco de la renkontiĝo al la eks-kasisto de ILEI, s-ro Ole Olsson, Södra Esplanaden 23, S-22352 Lund, Svedio

ILEI Libroservo

ILEI decidis starigi modestan libroservon por siaj membroj. Ĝi vendos perpoŝte la proprajn eldonaĵojn, kaj tiujn, kiujn ni ricevas interŝanĝe por abonoj al *Juna amiko* kaj membriĝoj en la Ligo el alimaniere nepagipovaj landoj. Ni lanĉos la novan servon en la venonta IPR, sed jam nun ni komunikas:

- Sur la sekvaj paĝoj vi trovos varbilon/mendilon por ILEI. Sekcioj ricevos stokojn, ankaŭ unuopuloj povas peti stoketon. Per la mendilo vi povas membrigi kolegojn al la Ligo, aboni *Juna amiko*, aŭ mendi kelkajn el niaj libroj. Ni petas vin antaŭpagi tiujn mendojn kaj sendi la mendilon al nia kasisto. Notu, ke la dua kajero de *Tendaraj tagoj* ankoraŭ ne aperis, kvankam ĝi estas kompostita. Ĝi antaŭvideble aperos en junio. Sekve, vi povas antaŭmendi ĝin kaj ni plenumos vian mendon tuj post livero el la presejo. La anoncita prezo estas speciala oferto por frumendantoj, la definitiva prezo verŝajne estos pli. Ĉiuj prezoj tie inkluzivas la surfacan ekspedon.
- Ni havas en stoko dek du ekzemplerojn de *La dangera lingvo* de d-ro Ulrich Lins, ni ofertas ilin je 180 svedaj kronoj (60 gld.). Ni havas ses ekz. de nova eldonaĵo taŭga por klasĉambra uzo kun pli aĝaj lernantoj *Anekdotoj pri famaj homoj* de E. Tvarošek, 60p. Eldonis Slovakia E-Asocio, 1992 je 40 SEK (13 gld.). Kaj kvar ekz. de *Slovakia Antologio* 528p. je nur 60SEK (20 gld.). Ni vendos tiujn al la unuaj petantoj. Prezoj inkluzivas surfacajn sendokostojn. Ne antaŭpagu. Ni sendos fakturon kun la libroj. Vendo nur kontraŭ konvertebla valuto. Mendu ĉe ILEI, MacGill, Esö u. 7 III, H-1034 Budapest, Hungario.

KONSTATOJ PRI LA NUNA ESPERANTO-INSTRUADO

El la raporto pri la IV-a Laborkunsido de Nordorientaj Esperanto-Asocioj Brazilo, Fortaleza-CE, 15-17. novembro 1991.

La metodoj kaj lernolibroj defenditaj, analizitaj kaj pridiskutitaj estis: Cseh-metodo de Andreo Cseh; Aŭdu kaj lernu de Sylla Chaves; Zagreba metodo de Internacia Kultura Servo; FEB-metodo de diversaj aŭtoroj; Esperanto Língua Viva de Paŭlo Amorim; Metodo Lorens de F. Valdomiro Lorens kaj Curso Conversacional de Jair Sales.

Pri tiuj lernolibroj estis emfazitaj ĉefe la jenaj karakteroj: (1) metodo: gramatika aŭ rekta (2) nivelo: baza, meza kaj supera (3) ekzerckajeroj (4) gvidlibro por instruistoj (5) vort-radikoj (6) gramatikaj elementoj (7) testoj/ekzamenoj (8) uzo de nacia lingvo (9) helpmaterialoj: sonkasedoj, diapozitivoj, muzikaĵoj (10) aspekto de la lernolibro (11) kosto por la gelernantoj (12) rezultoj laŭ enklasa instruado.

Post longaj kaj intensaj pridiskutoj de la supraj karakteroj, la kunsidantoj decidis elstarigi la jenajn konstatojn:

- Ekzistas granda kvanto de bazaj lernolibroj en Brazilo, sed kun raraj esceptoj, ili ne havas sinsekvon por la daŭriga kaj supera niveloj.
- Granda procentaĵo de la lernolibroj prezentitaj sekvas strukturon kaj modelon de „gramatikaj metodoj", tio estas, celas ĉefe la pasivan konon de la lingvo.
- Dum la preparado de la bazaj libroj, la aŭtoroj surbaze de la tro emfazita facileco de la lingvo, jam prezentas la tutan gramatikan strukturon kaj minimuman stokon de 600 vortoj. Tio pezigas la ellernadon de la lingvo ĉefe se la kurso doniĝas dum 3–4 monatoj.
- Ankoraŭ surbaze de la facileco de Esperanto, la aŭtoroj subtaksas la ekzercadon kaj la plejparto donas nur ekzerc-modelojn. Ili devus prepari apartajn ekzerc-librojn por la lernantoj kaj gvidlibrojn por la instruistoj.
- Eble pro la ekonomiaj-merkataj leĝoj, tio estas, timo malprofiti, la aŭtoroj preparas siajn verkojn laŭ malmodernaj kaj malallogaj aspektoj. Ĝenerale la lernolibroj estas senkoloraj kaj senbildaj. Tio kondukas al subkonscia senvalorigo de Esperanto.
- Esperanto-movado estas minoritata. En tiaj movadoj, ĉiuj fortoj devas unuiĝi por pli facile venki la obstaklojn kaj progresi. Konstateblas, ke preskaŭ

ĉiu esperantisto sentas sin kapabla produkti lernilon. Ili devus kunigi siajn fortojn, energiojn kaj monrimedojn por verki belaspektan lernilaron kaj bonkvalitan laŭ enhave.

● Pro la supraj motivoj, mankas instruhelpiloj kaj pro tio la instruisto, se li\ŝi konscias kaj se li\ŝi volas, devas mem prepari siajn instruhelpilojn kun perdo de la aspekto.

● Esperanto estas lingvo pli facila ol la naciaj lingvoj sed ĝenerale okazas seniluziiĝo pro la emfazo de ĝia facila lernebleco, kio fakte ne okazas sen granda strebo flanke de la instruistoj kaj lernantoj.

● Esperanto-kursoj devas celi al aktivan konon de la lingvo, kio ĉefe estas la paroligo de la gelernantoj. La aktiva uzado de la lingvo fierigas la lernantaron kaj stimulas ilin al plia daŭrigo en la lernado.

● Ankoraŭ regas en la konscio de la esperantistaro ke Esperanto devas esti instruata senpage kaj la instruisto devas ricevi neniun monon per ĝi por sia vivteno.

● Pro la deziro de kelkaj esperantistoj helpi en la disvastigo de la lingvo, ili sin lanĉis al senpaga instruado, multaj el ili sen la adekvata prepariĝo, kies rezultojn ni ĉiuj konas.

● Ĝis la 20–30-aj jaroj, Esperanto ricevis pli da apogo flanke de la ekstera publiko kaj aŭtoritatuloj. Kun la seniluziiĝo de tiuj generacioj, ili transigis al siaj idaroj antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto. Nuntempe ĝi ne estas rigardata kiel profitdona lernendaĵo. Ili ĝenerale malkonsilas kaj malhelpas al sia idaro lerni la lingvon (ili ne apogas, ne pagas).

La partoprenintoj de la laborkunsido prezentis ankaŭ solvojn pri la lanĉitaj problemoj:

* instigo de la instruistaro submetiĝi al meminstruiĝo per konstanta legado de fakaj kaj informaj revuoj kaj de bazaj Esperantaj verkoj.

* stimulo de la instruistaro sin submeti al la por-instruista selekta ekzameno de ILEI okaze de la Brazilaj Kongresoj de Esperanto kaj de la proksima porinstruista seminario

* organizado de porinstruista seminario anstataŭ la V-a Laborkunsido

* havigo de sufiĉa strukturo kaj organiziteco al la baza, meza kaj supera kurso tiel ke iom post iom ili fariĝu egalrajtaj al altnivelaj fremdlingvaj kursoj de la regiono

* la instruistaro, kune kun sia profesiiĝo, rajtu ricevi sian salajron samnivele kun la aliaj fremdlingvaj instruistoj

* malrekomendo de la gramatika metodo por enklasa instruado, ĉar ĝi ne estas paroliga kaj memfieriga

* eksperimentado pri Cseh-metodo dum la jaro 1992. Ĉiu aparta grupo strebu al tiu celo kaj interŝanĝu la rezultojn. Okazu ankaŭ A-seminario de Cseh-metodo.

ILEI – cele al la estonto



Akceli la oficialan enkondukon de Esperanto en lernejojn tra la mondo – jen unufraze la ĉefa celo de ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Sekve ĝi okupigas pri instruista trejnado kaj priservado; ĝi kontaktas edukajn ministeriojn kaj instancojn kaj klopodas porti spiriton de internacieco en la Esperantajn klasĉambrojn – emfazante respekton kaj toleremon inter la popoloj kaj kulturoj. Kiel specife ILEI laboras por plenumi siajn celojn, vi povas legi en la akompana Trijara Laborplano (1992-94).

Kiujn servojn ILEI proponas al vi?

... En unu vorto: internacieco! ... En pluraj vortoj:

- vi povas partopreni nian ĉiujaran unusemajnan konferencon, kie vi renkontos kolegojn el plej diversaj landoj kaj povos kompari instru-spertojn. Vi ĝuos fakajn prelegojn, forumojn, model-lecionojn, kune kun distra kaj kultura programo.
- vi povas sperti instruadon pere de Esperanto en la praktiko, kadre de la ILEI-gimnazio, kiu okazas paralele kun la konferenco. Se vi instruis Esperanton al junuloj inter 13- kaj 16-jaraj, ili eventuale povus mem partopreni la someran kurson. Instruistoj povas kandidatiĝi prezenti lecionojn.
- vi ricevos, kiel membro, la organon de ILEI *Internacia Pedagogia Revuo* 4-foje jare, plena je fakaj artikoloj pri lingvo-instruado, recenzoj de lernolibroj ks., kontakt-adresoj de E-klasoj kaj ĉiaj komunikoj pri la Ligo.
- vi povos aboni la junularan revuon *Juna amiko* eldonata de ILEI por junaj lernejanoj tra la tuta mondo. Ĝi donas facilan, aktivigan lego-materialon, kune kun dialogoj, rakontoj, enigmoj, kvizoj, kantoj, poemoj kaj multo pli, verkitaj de junuloj kaj instruistoj en ĉiuj mondanguloj.

- vi havos je dispono aliajn lernolibrojn kaj pedagogiajn verkojn eldonitaj aŭ kuneldonitaj de ILEI.
- vi povas partopreni la renomajn Internaciajn Metodikajn Seminariojn aŭspiciataj de ILEI, kaj aliajn aranĝojn de la sekcioj. Vi ricevos pere de ILEI informojn pri ĉiuspecaj kursoj (lingvaj kaj pedagogiaj) ofertataj en la plej diversaj E-centroj tra la mondo.
- vi povas pruvi vian lingvan kapablon pere de la tri-ŝtupa ekzamena sistemo funkciigata de ILEI en la nomo de ĝi kaj UEA, kaj rekonigi vian instrukapablon per partopreno de pedagogiaj kursoj organizitaj aŭ aŭspiciataj de ILEI, eventuale kun atesta ekzameno.
- vi povas akcepti vizitantan instruiston en via lernejo, por porti veran internaciecon al viaj lernantoj. Aŭ vi kiel instruisto povos vojaĝi internacie donante lecionojn en E-klasoj. ILEI ligos por taŭge kvalifikitaj instruistoj la necesajn kontaktojn.

Kiel vi povas servi al ILEI?

... Unuvorte: membriĝi. ... Duvorte: membrigi kolegojn! ... Plurvorte:

- Mendu niajn eldonaĵojn pere de la ĉi-kuna mendilo.
- Laboru aktive en niaj komisionoj aŭ sekcioj.
- Viaj donacoj al la Koleg-helpa kaso estas tre bonvenaj, ĉar kiel neniam antaŭe estas granda deziro inter instruistoj en landoj, kie transpago de kotizo estas malhelpata. Ni tamen ne volas rifuzi tiujn kolegojn, ĉar tio negus nian internaciecon.
- ILEI starigis Fondaĵon Szerdahelyi, honore al la memoro de la elstara hungara pedagogo, kiu ankau prezidis la Ligon. Donaco al ĝi konstruos por ni pli firman fundamenton por entrepreni bezonatajn projektojn. Donacante, vi povas indiki al kiu kampo vi deziras kontribui.

ILEI nun havas ĉirkau 800 membrojn. Mil-membra ILEI estus pli forta kaj laborkapabla! La Ligo ekmez-aĝas — baldaŭ ĝi festos la 45an datrevenon! Sed ĝi volas resti juneca kaj aktuala — strebante altigi la kvaliton de Eo-instruado en la mondo kaj vastigi la aplikeblojn. Por fari tion realisme kaj servi al la instruistoj ĝi bezonas pli da membroj kaj rimedoj — homaj kaj financaj.

Se vi mem instruas Esperanton en lernejo aŭ klubo, aŭ okupiĝas pri iu ajn aspekto de la edukado — via loko estas nepre en ILEI!

Kiu rajtas membriĝi?

Unuavice instruistoj aktive instruantaj Esperanton kun iu grado de oficialeco. Sed same instruistoj posedantaj Esperanton, dezirantaj internacian kontakton kun samprofesiaj kolegoj. Same instruistoj de ne-oficialaj klasoj aŭ kluboj, aŭ iu ajn, kiu interesiĝas aŭ okupiĝas pri lingvo-instruado aŭ internacieca edukado.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj:

Trijara laborplano (1992-94)

Ĉi tiu plano celas prezenti la gamon de eblaj kaj indaj agadoj por nia Ligo, estante samtempe maksimume ampleksa kaj konciza. La estraro kaj komitato povas modifi aŭ reinterpreti ĝian enhavon laŭbezone. Ĝia strukturo sekvas la dek-ĉefpunktan tagordon, kiun la Estraro uzas en siaj kunsidoj kaj raportoj.

1. Sekcioj kaj Membraro:

* Teni intensajn kontaktojn kun la sekcioj per vizitoj kaj regulaj cirkuleroj inter la numeroj de IPR.
* Revigligi sekciojn neadekvate funkciantajn.
* Admoni sekciojn, havantaj membrojn, kiuj restas neanoncitaj.
* Kuraĝigi sekciojn esti maksimume malfermaj al junaj praktikantaj instruistoj kaj novaj agemaj fortoj.
* Starigi novajn vojojn akcepti kotizpagojn per varoj kaj servoj kiam necese.
* Starigi novajn sekciojn (ekz. Rumanio, Litovio, Latvio, Ukrainio, Rusio, Kroatio, Aŭstralio, Nov-Zelando, Danlando, Albanio, Kubo, Meksikio.)
* Eldoni freŝan varbilon por membrigo kaj donacoj al Fondaĵo Szerdahelyi.
* Lanĉi konkurson por la plej aktiva sekcio.
* Aparte flegi la sekciojn en Ĉinio kaj Koreio pere de niaj estraranoj tie.

2. Komisionoj kaj komisiitoj:

* Malcentrigi la laboron per kreo de kerno de aktivaj internaciaj kunlaborantoj, ĉu kiel unuopuloj, ĉu kiel komisionanoj.
* Laŭgrade transigi la pli rutinajn taskojn al honorariitoj, zorgante pri ilia trejnado por plenumi pli postulajn kaj vastgamajn taskojn.

3. Financo:

* Kreskigi la kapitalon de la Ligo per identigo de samtempe valoraj kaj enspezigaj projektoj.
* Alvokadi por donacoj al Fondaĵo Szerdahelyi kaj starigi por ĝi kuratorojn kaj gvidliniojn, por ke ĝi subtenu difinitajn projektojn, ĉefe de ILEI mem.
* Faciligi testamentadon al la Ligo.
* Permesi aliron al la servoj de ILEI (membreco, eldonaĵoj, konferencoj) en kiel eble plej vasta gamo de nekonverteblaj valutoj.
* Krei manierojn uzi la tiel enspezitajn sumojn por plenumi ligan laboron.
* Ricevi monon el ekstermovadaj instancoj por plenumi edukajn projektojn.

4. Ekzamenoj lingvaj:

* Reekzameni la postulojn de la elementa kaj meza ekzamenoj.
* Krei konsilarojn por la ekzamenantoj kaj kursocentroj.

* Daŭrigi la kiel eble plej vastan proponadon de la ekzamenoj.
* Revizii kaj reeldoni la gvidilon kaj\aŭ libron de preparaj ekzercoj. Eldoni rekomendatan libroliston.
* Lanĉi la superan nivelon: regularo, postularo, skemo, specimenaj testoj, preparaj ekzercoj, legolisto.



ZHANG Danchen, ĉino. Asociata Profesoro pri lingvo-instruado en la Normala Universitato Huazhong en Wuhan. Vic-sekretario de ILEI: Organizas ekzamenojn en Ĉinio, eldonos bultenon "ILEI en Azio", kuraĝigos fondon de sekcioj en aziaj landoj, organizos la unuan ILEI-seminarion pri instru-medotiko en Ĉinio.

5. Servoj al instruistoj

* Registri kursojn ĉiunivele kaj aperigi la rezultojn en la sama lerneja jaro – ĉiujare se laborfortoj permesas.
* Registri la kondiĉojn por instruado en la diversaj landoj, kaj specife noti kaj ekspluati ŝanĝojn.
* Aperigadi korespond-petojn, individuajn kaj klasajn. Akceli kontaktojn ĉiuspecajn inter klasoj, ekz. reciprokaj vizitoj, internaciaj konkursoj.
* Diskonigi internaciajn aranĝojn por lernejanoj.
* Kompili listojn de lernejoj, kiuj akceptos vizitantojn:
  - vizitanta eksterlanda instruisto (gast-lecionoj)
  - interesaj eksterlandanoj (prezento de ekzotikaj temoj)
  - pedagogo, kiu povus prelegi aŭ gvidi seminarion por instruistoj (ĉu movade organizita, ĉu tra instruistaj programoj)
* Kompili liston de taŭgaj vizitantoj.
* Starigi aŭ diskonigi ekzistantajn naciajn/sekciajn servojn faciligi vizitojn.

6. Instruista trejnado kaj universitata agado

* Apogi kaj organizi Internaciajn Metodikajn Seminariojn kaj similajn fakajn aranĝojn. Organizi la unuan tian ILEI-aranĝon en Ĉinio ĝis 1994.
* Fortigi la metodikan flankon de niaj konferencoj, i.a. per ILEI-Gimnazio.
* Apogi aŭ starigi metodikajn kursojn (divers-longajn kaj -celajn, sed precipe tre praktikajn) kaj enmovade kaj kadre de oficialaj instruistaj trejnejoj.
* Peri inter universitatoj kun oficialaj aŭ duon-oficialaj kursoj.
* Diskonigi disertaciojn verkitaj en aŭ pri Esperanto.
* Diskonigi la eblecojn por internacia klerigo.

7. Konferencoj:

* Logi partoprenantojn el kiel eble plej diversaj mondpartoj, unuavice praktikantajn instruistojn de Esperanto.
* Fortigi la fakan programon, i.a. per pli granda diverseco de kunventipoj: ekz. forumoj, paneloj, demonstro-lecionoj, rol-ludoj, ekspozicioj ks.
* Faciligi interŝanĝon de spertoj pri instruado ĉiuspeca.

8. Eksteraj rilatoj:

* Kontaktadi kun Unesko kaj UN pri internacia edukado.
* Aktive partopreni en la 'Jaro de la Familio' de UN (1994) kune kun UEA; specife pri organizado de komuna seminario sub aŭspicio de UN/Unesko.
* Kontaktadi kun jam konataj internaciaj edukaj organizaĵoj.
* Aktive kunlabori en la Projekto 'Eŭropo 1992' de UEA/ILEI/EEU, kiu inkluzivas rilatadon kun edukministerioj.
* Konstrui kaj diskonigi superrigardon pri la ĉefaj fondaĵoj kaj organizaĵoj agante internacie pri lingvo-instruado (sekretariejo, celoj, konferencoj, eldonaĵoj, servoj, ekzistantaj kontaktoj kaj kontakt-personoj).
* Proponi nacilingve tradukitajn aŭ verkitajn artikolojn al la faka gazetaro pri:
  - edukado por internaciismo
  - la propedeŭtika valoro de Esperanto
  - la praktikaj kaj etikaj valoroj de Esperanto
  - prezento de rezultoj de Esperanto-instruado
* Reprezentiĝi en internaciaj konferencoj pri edukado kaj lingvo-instruado.



La ĉeestintaj estraranoj en la 25a konferenco en Voss (Norvegio) de maldekstre:
- s-ino Marija BELOŠEVIĆ, kroato. Studento de politik-scienco. Sekretario de ILEI: Prizorgas landajn sekciojn, membro-varbadan kampanjon kaj la ekzamenojn.
- Ronald GLOSSOP, usonano. Profesoro pri filozofio kaj Direktoro de Pac-Studa Programo en la Universitato de Sud-Ilinojso en Edwardsville; aŭtoro de du libroj kaj plurdekoj da artikoloj pri etiko, filozofio, paco kaj komunikado. Vic-Prezidanto de ILEI: Respondecos pri eksteraj rilatoj, precipe kun UN kaj Unesko kaj kun edukaj instancoj.
- s-ino BARCSAY Zsuzsa, hungaro, lerneja bibliotekistino kaj konsilanto por E-instruistoj en Hungario. Plenumos servojn al instruistoj, organizos la fakajn flankojn de niaj konferencoj, gimnazio kaj IMS. Starigos intensivajn metodikajn kursojn por instruistoj aŭ trovos aŭspiciindajn kursojn. Pretigos la superan nivelon de la ekzamenoj.
- Stefan MacGILL, nov-zelandano, diplomita instruisto, redaktoro. Prezidanto de ILEI: Respondecas pri planado kaj kunordigo, kreskigas la eldonan agadon.
- Bertil ANDREASSON, svedo, diplomita instruisto. Kasisto de ILEI: Mastrumas la financojn, la kapitalon kaj Fondaĵon Szerdahelyi, praktike organizas la Konferencojn.

* Konscii pri similcela naci-nivela agado, prizorgata de la sekcioj aŭ la Landaj Asocioj de UEA.

9. Eldonado:

* Eltrovi konvenajn nekostajn kompost- kaj pres-eblojn, prefere tiujn, kiuj mildigas alikampajn transpagajn problemojn.
* Akiri taŭgajn manuskriptojn, samtempe bezonatajn kaj enspezigajn.
* Krei administran bazon por efike pretigi librojn: trakti kun aŭtoroj, presejoj, eldonistoj kaj distribuistoj.
* La plimulto de projektoj celu kovri siajn kostojn ene de 12 monatoj. Bezonataj sed nerendimentaj verkoj estu esceptaj, kies kostojn kovru la finance sukcesaj. La eldona agado sume kreskigu la kapitalon de la Ligo.
* Rilati kun fidindaj eldonejoj pri komunaj eldonoj por limigi la bezonon je kapitalo.
* Prioritataj kampoj estas:
  - lernolibroj, gvidiloj, kasetoj, vidbendoj,
  - laborlibroj (diversnivelaj kaj integritaj)
  - pedagogiaj verkoj kaj instruistaj gvidiloj
  - ekzerclibroj ligitaj al la ekzamenoj
  - materialo pri lingvaj problemoj

10. Movadaj agadoj:

* Eluzi la diskonigajn eblecojn de UEA kaj aliaj por teni movadanojn bone informitaj pri la Ligo.
* Fortigi la renomon de Tago de la Lernejo.
* Proponi al UEA, ke ILEI reĝisoru ĝudkan ĉeftemon de iu estonta UK.
* Avangardi en la movada debato pri planado kaj strategio, lanĉita per la Proklamo de Voss en 1991.
* Starigi kontaktojn kun aliaj edukaj instancoj, kaj kun la Fakaj Asocioj de UEA; unuavice kun LIBE kaj TEJO.
* Saluti aŭ partopreni (per prelegoj, budo, ekzamensesio) naciajn kaj aliajn movadajn kongresojn kaj aranĝojn.
* Kunlabori kun AIS, ELTE, KCE, IEI kaj similaj organizoj pri edukaj projektoj kaj kun TEC kaj aliaj pri pedagogia terminaro kaj bibliografio.



SO Ĵin Su, koreo. Asista Profesoro pri ekonomiko en la Universitato de Kangnam, Koreio, dum unu jaro gast-profesoris en la Universitato de Glasgovo, Britio. Fortigos la korean kaj japanan ILEI-sekciojn, apogos la starigon de sekcioj en aliaj aziaj landoj, kunordigos la universitatan agadon, preparos la vojon por ILEI-konferenco en Koreio en 1994.

Jen la planoj, kiujn vi povas subteni per donaco kaj en kiuj vi povas aktive kunlabori! Anoncu vin!

Sekcioj de ILEI agas en 31 landoj, kaj ni havas reprezentantojn en pliaj landoj. La nombro de landoj en la mondo abrupte kreskas, atendeble ankaŭ la nombro de niaj sekcioj! Se ekzistas sekcio por la teritorio, kie vi loĝas, aliĝante al ILEI, vi aŭtomate apartenos ankaŭ al ĝi.

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio: Alex Humet, Van Campenhoutstr. 4, B-2600 Berchem
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo SP
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
Ceĥio: Miroslav Malovec, Charkovska 7/10, CS-625 00 Brno
Cinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EST-200001 Tallinn
Finnlando: Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
Francio: Edmond Ludwig, 26 Route de la Schlucht, F-68140 Münster
Germanio: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-W-8900 Augsburg
: Till-Dietrich Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo: Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio: vakas
Korea Resp.: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Nederlando: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko: Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: Turnu vin al NEL, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5
Pollando: Turnu vin al E-Centro Bialistoko, ul. Piasta 52/21, PL-15-044 Bialystok
Portugalio: Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
Slovenio: Sonja Tavĉar, Liminijanska 6, SLO-66320 Porotoroz
Sud-Afriko: Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando: Nicole Margot, Tour Grise 28, CH-1007 Lausanne
Venezuelo: Inĝ. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaĺre)

Krome ILEI havas reprezentantojn en Albanio, Bangladeŝo, Centrafrika Respubliko, Ĉilio, Hinda Unio, Irano, Kroatio, Niĝerio, Rumanio kaj Tanzanio. Ĝi havas komisionojn pri Didaktikaj ludoj, Ekzamenoj, Eŭropa Komunumo 92, Gazetara Servo, Lernejaj Konkursoj, Statistikado, Statuto, Terminologio kaj Unuiĝintaj Nacioj (Jaro de la Familio 94).

ILEI deziras, ke post la tralego de ĉi tiu informilo kaj la trijara laborplano, vi konvinkiĝis, ke via loko estas ene de ILEI! Skribu tuj al via landa sekcio aŭ sendu la ĉi-sekvan aliĝilon al la Kasisto de ILEI. Ni kore bonvenigas vin!

ALIĜILO KAJ MENDILO POR ILEI:

SENDU ĈI TIUN MENDILON AL LA KASISTO, s-ro Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio, kune kun indiko pri via pago.

Nomo:.....
Adreso:.....
.....
Aĝo:.....Sekso..... Profesio:.....
Rilato al E-instruado:.....

Mi volas mendi la sekvajn: *(Prezoj inkluzivas sendokostojn)*

Membreco en ILEI por loĝanto en teritorio kun landa sekcio 80 SEK _____
Membreco en ILEI por loĝanto en teritorio sen landa sekcio 50 SEK _____
___ Abono(j) por *Juna amiko* (surface) po 40 SEK _____
___ Abono(j) por *Juna amiko* (aerpoŝte) po 45 SEK _____
___ Ekzempleroj de Tendaraj tagoj vol 1. po 40 SEK _____
___ Ekzempleroj de Tendaraj tagoj vol 2. po 40 SEK _____
___ Ekz. de *'La soci-politika kaj pedagogia kaj kultura valoroj de Eo'* (Symoens). Angle po 20 SEK _____
___ Ekz. de la sama verko france po 20 SEK _____

Mi volas donaci sekve:

* Al la koleghelpa kaso por membrigi netranspagipovajn instruistojn_____
* Al Fondajo Szerdahelyi, sen specifa celo
* Al Fondajo Szerdahelyi, kun specifa celo, nome: _____
____ eldonado ____ trejnado de instruistoj ____ informado
____ ILEI-Gimnazio, alia:_____ _____

SUME MI PAGAS EN SVEDAJ KRONOJ: _____

Mi pagas per:

___ Postĝirkonto: 682117-7 (Stockholm) 'Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio.

___ Al la interna konto de ILEI ĉe la Centra Oficejo de UEA (ilek-a). La nederlanda poŝtĉekkonto de UEA estas 378964: CO de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.

___ Bv. sendi al mi pli da ekzempleroj de ĉi tiu varbilo.
___ Bv. sendi al mi pli da ekzempleroj de la trijara laborplano.

Subskribo: _____ Urbo: _____ Dato:_____

RECENZO

LINGVO-ALPROPRIGO EN FRUA AĜO

Leg-raporteto pri la numero aŭg.-sept. de LE FRANÇAIS DANS LE MONDE (La franca lingvo en la mondo)

ERTL István

La revuo kiu ĉefteme traktas la instruadon de la franca ĉie en la mondo kaj ties problemojn, dediĉas duoblan numeron al la temo *Lingvoinstruado kaj -alproprigo en frua aĝo* (Enseigements/apprentissages précos es des langues). La temo aktualas pro tio ke en Francio nun oni ekinstruas lingvojn pli fure, en la kvara lernojaro. Evidente, oni rapide asocias kun tio niajn ŝatatajn „kapvortojn" **propedeŭtiko** kaj **denaskeco**, almenaŭ. Mi plukos jen resume, jen kaprice el la raportoj kaj konkludoj de niaj kolegoj prifrancaj.

Michèle GARABÉDIAN (F): Lingvopolitiko ĝenerale kaj en la lernejo

La Eŭropa Konsilio volas ekirigi pripensadon kaj spertinterŝanĝon pri „la frua instruado de vivantaj lingvoj". Tiucele kongreso en Edinburgo (jun.91) traktis la „enigon de fremdlingvo-instruado en la normalan strukturon de bazlernejoj". Ĉe la decidoj oni nepre respektu jenajn principojn:

– lingvoinstruado komenciĝu kiel eble plej frue, certe antaŭ la oka vivojaro;
– oni diversigu la instruplanojn, sed konsekvence integru la „lingvan demandon" en la programon;
– oni ne tuj atendu rezultojn.

Jean FAYARD (F): La fremdaj lingvoj en la bazlernejo

Estas vere ke Francio malrapide reagas pri la frua instruado de fremdaj lingvoj, sed oni atentu ke ties enkonduko ekde la kvara instrujaro okazas nur en Italio kaj Skotlando sur simile vasta skalo. Problemoj: nur 10 % de la instruantoj en la novaj klasoj instruas ion alian ol la anglan, kaj nur en 5,5% de la lernejoj eblas elekti el alia lingvoparo ol la angla-germana. Ne plu klaras ĉu devas temi nur pri „sentemigo pri la fenomeno lingvo" (prefere) aŭ pri (enkonduka) instruado; pri propedeŭtiko aŭ pri komunika kapabligo. Oni atentu ke la novaĵo ne fariĝu plua distingilo de socia rango!

Jacques-André TCHOUMY (CH): Multkultureco kaj plurlingveco

Svisio estas malpli idilia lingvejo ol oni imagus. Konfliktas la principoj de „teritorieco" kaj de plurlingveco: ĉu koncentriĝi pri la lingvo dominanta surloke aŭ eduki plurlingvulojn? Se ĉilasta, do je kiuj lingvoj? (La kantonaj eduk-ministroj kontraŭas la portugalan kiel eduk-lingvon en Zuriko, aŭ la turkan en Ĝenevo). „Ĉu estas logike lukti por la protektado de malofta izotera specio, kaj samtempe subteni la ideon ke ĉiuj devas paroli angle por ĝenerale interkompreniĝi?"

Petar GUBARINA (HRV): La rolo de aŭda percepto en la frua lernado de lingvoj

Ĉar nia neŭropsikologia maturiĝo malĝustigas nian aŭdan perceptadon, post la 6-7-a vivojaro la kondiĉoj por lerni lingvajn sonojn iĝas pli kaj pli malfavoraj. Post la 9-10-a jaro, nia gepatro-lingva sonsistemo jam tute kondiĉas la aŭdpercepton de novlingva sonaro.

François WEISS(F): Al integrita instru-programo

La spertoj montras ke post sep jaroj da semajne trihora lernado (750 h) duono de la lernantoj ne kapablas interparoli fremdlingve kun samaĝuloj – ĉar, dum tiu tempo, ili havis la okazon mem paroli nur dum 30 minutoj! Regas ia klasik-humanisma troperfektemo pri la ĝusteco de la eldiraĵoj kaj de la prononco.

Rachel COHEN (F): Lerni kiel eble plej juna (intervjuo)

(Cohen estas direktoro de 10 jaroj de franca-angla internacia lernejo en Parizo, la Aktiva Dulingva Lernejo Jeannine Marcel.)

La vorto „fru-aĝa" ne havas sciencan valoron koncerne lernadon de lingvoj. Ju pli frue, des pli bone, ĉar en franclingva medio trijarulo lernas paroli france en tri monatoj sen akcento, sed sepjarulo jam bezonas pli da tempo kaj penado; 11-jarulo devas konscie korektadi sian prononcon. Lingvolernado ne kaŭzas cerban troŝarĝon – eĉ male, ĝi stimulas la pensadon. Ne gravas kian lingvon oni elektas kiel unuan fremdan; gravas ke la instruado okazu lude, util-centrece, ja infanoj lernas lingvon spontane, ĉar ties uzo interesas ilin. La nuntempa lingvo-instruado estas plejparte tial fiaska, ĉar por la eko oni elektas la 6-an, 11-an aŭ 12-an vivojaron – kiam ĝuste okazas grandegaj ŝanĝoj en la infana vivo (lernejaniĝo, transiro al nova klastipo), kiuj elĉerpas ties atenton. Nepras profiti el la fleksebleco de plej junaj cerboj por lingvolernado!

Louise DABÈNE (F): Ĉu frua lingvo-instruado aŭ konsciigo pri lingvoj?

Ĉu oni profunde pripensis la utilojn kaj la malutilojn de frua lingvo-instruado? Ĝi evidente havas fonetikajn avantaĝojn, sed kion pri sintakso kaj semantiko? Pri tiuj ja plenkreskuloj havas kognitivan avantaĝon.

CDL (Centro de Lingvo-didaktiko) esploras, kiaj aktivadoj devus antaŭi la lingvo-instruadon por igi ĝin pli efika. Du ideoj:

– ĉar infanoj ofte ne distingas inter frazo kiel lingva abstraktaĵo kaj ĝia enhavo, oni instruu al ili la arbitrecon de signaroj. Unu grupo inventu signosistemon kiun la alia malkodos.

– oni utiligu la „ĉirkaŭajn" lingvojn, tiujn troveblajn en la loĝmedio, por esplorigi ilin fonetike (kiel parolas dialektanoj? kaj fremduloj?), morfo-sintakse (kion ŝanĝas vortorda modifo? kion signifas afiksoj?), leksiko-semantike (kiuj vortoj similas en la fremda lingvo kaj en la propra?), eĉ grafike (ĉinaj, arabaj karaktroj).

La celo ne estas elformi etajn lingvistojn, sed konsciigi pri la diverseco de lingvoj, fari tiujn objekto de la infana observado, respektigi lingvajn kaj kulturajn aliecojn.

Martin ABDALLAH-PRETCEILLE (F): Lingvo(j), kulturo(j) kaj komunikado

Dulingveco („bilinguisme") estas nur speciala, kvankam la plej spektakla kazo de „dialogismo": de la kunĉeesto de pluraj parolmanieroj ĉe la infano, laŭ la komunika situacio. Indas nek timi nek mistifiki ĝin.

Louis PORCHER (F): Kelkaj sociologiaj rimarkigoj por la edukado de instruistoj

Fremduleco, alieco fariĝas ĉiam pli banala. La lerneja ĉeesto de aliligvanoj kreas etoson kiu konvinkas pri la eblo lerni aliajn lingvojn. „Perdante el sia mistero, la fremdaj lingvoj ne plu timigas."

ĈU?

ERTL István
Vignolastraat 48.
NL-3066 BP Rotterdam

KOMUNIKADO en la EŬROPA KOMUNUMO 1992

Projekto UEA/ILEI/EEU

„La Eŭropa Komunumo baraktas, male al la grandpotencoj kiel Usono, Japanio kaj en iuj aspektoj ankaŭ Sovetunio, kun komplika kaj multekosta komunikadstrukturo. [...] Tiu situacio lokigas la EK-on en postrestanta pozicio rilate al la aliaj ekonomiaj grandpotencoj." Jen la tezo, sur kies bazo la aŭtoroj de la broŝuro proponas diskuton pri tiu temaro je la plej alta politika nivelo. Post la enkonduka prezento de la agadplano, la libreto detale prezentas la nunan komunikadan situacion de la Komunumo, kune kun la aktualaj klopodoj plibonigi ĝin.

Partoj de la verko celas informi kunlaboremajn esperantistojn pri la konceptoj de la laborgrupo, alvoki ilin aliĝi en la opaj fazoj de la projekto. Aliaj partoj liveras pluajn faktojn pri la nuna komunikada misfunkciado de la Komunumo. Kaj la tria komponento estas la prezento de allogaĵoj de Esperanto (ekz. 10 avantaĝoj de Esperanto, propedeŭtika valoro, aldone la 16 reguloj) por la nacilingvaj tradukoj.

Listo de la esperantistaj ekspertoj delegotaj al informkunsidoj kaj bibliografio kompletigas la dokumenton. Mendu ĉe la libroservo de UEA.

Juna amiko **ekde nun eldonata de ILEI. Abonu la revuon de perantoj en 30 landoj, tra la abonservo de UEA aŭ rekte per la kasisto de ILEI!**

REAGOJ

Pri tabuaj demandoj

Gratulinde reagalvoka estis la *novjara medito de la prezidanto*.

Ŝajnas al mi, ke necesus rezultoj de multhoma publika enketado por statistike konfirmi ĉu vere averaĝe 1 mondano el 5000 (0,02%) parolas **flue** Esperanton (se oni aŭdacas sampasteĉi nedenaskajn parolantojn de Esperanto kaj denaskajn parolantojn de aliaj lingvoj,ja temas pri flueparolantoj, ĉu ne?) Se ne, la multaj derivitaj statistikoj estas nura matematika ludo.

Kaj kiom fakte gravas tiu averaĝa denso, tiu „kritika" (decida?) maso? Senfinaj seniluziiĝoj interkrokodilaj konvinkas min, ke Esperanto estas almenaŭ tiom socia kiom lingva fenomeno, ke plej multaj homoj restas esperantistoj pro „amikaj rondoj" kaj laŭ mi, relative malmultaj fortaj kaj entuziasmaj „kernoj" (urboj, regionoj) en diversaj landoj kiuj vigle interagadas, preskaŭ garantius/as la pluvivon de Esperanto. Anekdote mi jam plurfoje rimarkis, ke krokodiloj kiuj daŭre klubumas kaj vojaĝas kun esperantista amika rondo povas preskaŭ senintence fariĝi sufiĉe fluparolantaj. Laŭ tiu vidpunkto, anigo en allogan rondon kadre de tia kerno kaj „ĝemeligo" de kernoj alprenas „kernan" gravecon (eble eĉ plian ol la elverŝado de limigitaj forto kaj mono en eventuale ne-tre-esperigaj klopodoj „tutmondigi" Esperanton).

Fine mi ŝatus proponi ankoraŭ du „tabuajn" demandojn (eĉ se ili ne rekte kondukas al instruinstigo).

Kiom da „kulturo" fakte havas propre Esperanto? P.V., nebulinte pri „spirita evoluo" notas ke kulturo „postulas" komprenon pri belartoj kaj beletristiko. Nu almenaŭ skriban verkaron ja havas Esperanto (la demando, kiom da esperantistoj estas edukitaj paroli Esperanton laŭ ĝia propra lingva spirito, estas alia – eble pli interesa – afero). Sed ĉu kulturo ne estas vere la tuta vivmaniero de homgrupo, la *karakter(iz)aj* manĝaĵoj, vestaĵoj, humuro, eduksistemo, leĝaro, moralo ktp. ktp. Kiomgrade „Esperanto" havas tiajn?

Teme de moralo vi eble diras „ĉu ne la *interna ideo*?" Sed kiom *unika* estas fakte la interna ideo? Supozi ke el ĉiuj internaciaj organizoj kaj kontaktoj nur la esperantistajn – kaj ĉiujn esperantistajn – penetras spirito de amika komprenemo, estas por mi same mise kiel pensi ke nur kristanoj vidas *la lumon*.

Polemike via
Mike SADLER

Gratulojn pro tiu artikolo! Ne plu estu tabuoj tiaj. Por objektive argumenti kaj agadi, la esperantistoj ne plu timu la realecon. Ĝin mi fotokopiis por diskonigi al kelkaj aktivuloj, kiuj ne abonas IPR-n.

Germain PIRLOT

EL LA INFORMILOJ DE LA SEKCIOJ

ĈINIO

La dua eldono de la *Materialo pri la oficiala Esperanto-instruado en Ĉinio* [SHAO Rong (Soliva) kaj ZHANG Xiaoxia] prezentas informojn pri superaj kursoj tra la tuta lando (adreso, instruisto, nombro de kursanoj, uzita lernmaterialo, rezulto de la kurso.

GERMANIO

La 100-an membron oni salutas en la AGEI-cirkulero 4/91. El la IPR-ampleksa eldonaĵo estu menciitaj: * Unua artikolo de Michael Josef SCHERM el la serio pri E-instruado; ĝia temo estas la unulingvaj vortaroj. * Uwe Joachim MORITZ: Ĉu internaciismaj pedagogoj kontraŭ etnaj minoritatoj?

Esperanto kaj Instruado iĝos la nova titolo de la revuo, kio donos liberecon al la germanaj gekolegoj „raporti **kaj** pri esperanto (lingvaj demandoj, E-konferencoj ktp.) **kaj** pri la instruado de Esperanto **kaj** ankaŭ pri instruado ĝenerale".

NEDERLANDO

„NGGE sciigas" unuavice siajn membrojn pri aktualaĵoj de ILEI. Granda strebo de la sekcio estas kolekti ĉiuspecajn lernolibrojn. Kolego Ton VERWOERD atendas donacitajn lernolibrojn, por ke la estonta generacio daŭrigu vian instruistan taskon laŭ pli favoraj kondiĉoj... (Luksemburglaan 545, 1966 MJ Heemskerk, Nederlando)

SVISIO

Kultura Centro Esperantista en 1992 denove akceptas kursanojn kaj gastojn! Lingvokursoj okazos jam en februaro kaj marto. Aperis alloga afiŝ-forma kolore presita programo por la tuta 1992: petu ekzemplerojn por via klubejo! Almenaŭ du kursoj por instruistoj okazos (vidu nian kalendaron).

SENDU AL LA REDAKCIO
LA INFORMBULTENON, CIRKULERON DE VIA SEKCIO
ESTAS JA BEZONO DE
DUDIREKTA INFORMFLUO !!!

BRAZILO

El ĉefurbo Brazilio oni proponas ĝemeliĝon inter lernejoj kie Esperanto estas instruata. Ĝemeliĝo signifos la jenon: Esperanto-korespondado inter la gelernantoj de la ĝemelaj lernejoj, interŝanĝo de informoj pri eduk-metodoj, interŝanĝo de lernolibroj uzataj por instrui matematikon, geografion, biologion, historion ktp., interŝanĝo de fotoj ktp. Skribu al E-Asocio de Brazilio, C. P. 11.1124, BR-70084 Brasilia DF, Brazilo.

Ekzamenoj tra tri jaroj

Tri jarojn post la relanĉo de la ekzamenoj, transprenas la gvidadon nova sekretario de la Ekzamena Komisiono. Indas rigardi kiom sukcesis la strebata popularigo kaj tutmondigo. La lasta jaro 1991 estis ĉiurilate la plej sukcesa: rekorda nombro de sesioj kaj kandidatoj. Dek sesioj en ok landoj: trifoje en Ĉinio – la lando kun la plej granda nombro da sesioj kaj kandidatoj tra la jaroj kaj kie la ekzamena gvidlibro estis eldonita enlande du-lingve. Unuafoje en Rumanio, (la plej granda sesio) kie impresis la serioza preparado sub malfacilaj kondiĉoj. En Bulgario, kie la enlanda studplano tre proksime sekvas tiun de la ILEI-ekzamenoj. En Belgio, kie la movado, kvankam forta, dediĉas sian forton al aliaj kampoj – precipe informado – kaj ne organizas proprajn enlandajn ekzamenojn. En Hungario, ĝuste en instruista trejnejo. En Germanio, en junulara renkontiĝo. Ĉiu sesio iumaniere pravigas la aserton, ke ni portas la ekzamenojn al la bezon-lokojn, ankaŭ en landojn kun severaj ekonomiaj kaj sociaj problemoj, ĝis inkluzive militado.

Sukcesintoj laŭ landoj

Lando	1989	90	91	Sume
Ĉinio	14	0	27	41
Rumanio	0	0	22	22
Belgio	2	0	13	15
Usono	8	4	0	12
Bulgario	0	0	10	10
Hungario	0	0	10	10
Francio	5	3	1	9
Jugoslavio	2	4	3	9
Svedio	3	5	1	9
Nederlando	3	3	2	8
Germanio	2	1	2	5
Kanado	2	3	0	5
Italio	1	3	0	4
Svislando	3	1	0	4
Brazilo	1	0	2	3
Finnlando	0	0	3	3
Hispanio	0	2	0	2
Meksikio	0	2	0	2
Sovetunio	0	0	1	1
Irlando	1	0	0	1
Norvegio	1	0	0	1
Ruando	1	0	0	1
Alĝerio (Svis)	0	1	0	1
Ĉilio	0	1	0	1
Nov-Zelando	0	1	0	1
Malagasa DR	0	1	0	1
Israelo	0	0	1	1
Tanzanio	0	0	1	1
Islando	0	0	1	1
Britio	0	0	1	1
Irano	0	0	1	1
SUME:	49	35	102	186

La 186 sukcesintoj el 1989-91 venas el 31 landoj de ĉiuj kontinentoj: 63 el okcidenta Eŭropo, 52 el orienta, 43 el Azio, 23 el Ameriko, 4 el Afriko kaj 1 el Oceanio. Pliaj statistikoj troveblas apude. Gazetara komuniko kun tiuj informoj dissendiĝis vaste.

Transdonante al la nova sekretario, s-ino M. Hunnninck, Centre Culturel 'La Charité', B.P. 136, F-84200 Carpentras, estas farita informilo por centroj dezirantaj organizi ekzamenojn. Restas pretigi konsilaron por ekzamenantoj. Restas reeldoni la gvidilon, kun listo de rekomendataj libroj. Restas lanĉi superan nivelon. Konstanta bezono estas pli da kompetentaj laborfortoj verki novajn testojn; la nuna intensa ofertado forkonsumas ilin pli rapide ol ni povas krei ilin. Restas la dezirindeco agnoskigi la ekzamenojn ĉe oficiala eduka instanco. Restas al IEK elekti novan prezidanton. Kvankam tiu *'restas'*-listo longas, la lastaj tri jaroj portis solidajn atingojn: la gvidlibro estis tre fervore akceptita; sesioj estas sopirataj; la ekzamenoj disiras multe pli vaste ol iam ajn antaŭe – ĉio tio donas bonan bazon por la pluiro.

Stefan MacGill, demisianta sekr. de IEK.

Monato Sesio	Kandidatoj	Elemente	(Kontentige	Bone	Tre bone)	Meze	Sume
Apr Odorheiu S. (R)	23	9	2	8	2	12	21
Jul Veliko Tarnovo (BG)	13	1	1	3	8	12	13
Jul Bergen (N)	19	9	3	2	1	6	15
Aug Hefei (CN)	?	1	4	1	1	6	7
Aug Guangzhou (CN)	?	4	1	6	0	7	11
Sep Subotica (YU)	2	0	0	1	1	2	2
Sep Bruselo (B)	14	7	1	3	2	6	13
Nov Szombathely (H)	11	0	0	8	2	10	10
Dec Tangshan (CN)	9	3	2	1	3	6	9
Dec Cuxhaven (D)	1	1	0	0	0	0	1
10 sesioj	ĉ 110	35	14	33	20	67	102

Sesioj		Landoj		Sukcesintoj						
	Nombro	Kontinentoj		Elemente	Meze kontentige	bone	tre bone	meze sume	ĈIUJ SUME	Kont. Landoj
1989	7	6	1	14	9	15	11	35	49	15 . 4
1990	9	6	1	17	3	7	8	18	35	15 . 4
1991	10	8	2	35	14	33	20	67	102	18 . 4
SUME:	26	15	4	66	26	55	39	120	186	31 . 5

Protokolo de sukcesintoj en la elementa ekzameno 1991

(35 personoj el 11 landoj)

Lando, urbo , nomo, sesio

Belgio, Belgrade. LEPAGE, Georges (Br)
Belgio, Beringen. ROMBAUT, Gustaaf (Br)
Belgio, Drongen. DE COSTER, Ilja (Br)
Belgio, Erpent. TILLEUX-C, Gilen (Br)
Belgio,Kalmthout. NEVELSTEEN,Yves (Br)
Belgio, Marché-en-Famenne. KRAWIEC, Julianna (Bruselo, septembre)
Belgio, Marché-en-Famenne. KORKUS, Hélene (Br)
Brazilo,Farol. JATOBA,Nieder Silveira, (Be)
Bulgario, Pleven. SOTIROVA, Elena (VT)
Ĉinio, Anhui. ZHANG Yuan (H)
Ĉinio, Shaoguan. LIN Xiaochan (G)
Ĉinio, Guangzhou. JIAN Weijian (G)
Ĉinio, Guangzhou. HE Weiming (G)
Ĉinio, Nanhai. LIANG Yingxiang (G)
Ĉinio, Qingdao. ZHONG Tao (T)
Ĉinio, Changsha. WANG Caohai (T)
Ĉinio, Tumen. LUO Qinghua (T)
Finnlando,Källkullen. ANTSKOG,Carola (la sekvaj ses en Bergen julie)
Finnlando,Tampere. LAAKSONEN, Terhi
Germ.,Miltenberg. FARRENKOPF,Ulrich
Germanio,Rendsburg.LEHMMANN,Wilma
Islando, Hafnarfjordor. MELBERG, Loftur.
Israelo, Haifa. GREGORY-ZIELINSKI, Michele.
Jugoslavio, Teslic. KRAGIC, Gradimire.
Rumanio, Timisoara. POPA, Radica (C)
Rumanio, Cluj. BANDICI, Claudiu (OS)
Rum.,Csomafalva.MADARÁSZ,Katalin(OS)
Rumanio, Gheogheni. FEKETE,Ildiko (OS)
Rumanio, Gheogheni. VASS, Edith (OS)
Rumanio, Ocna de Sus. PAROJDI, Kálmán-Endre (Odorheiu Secuiesc aprile)
Rumanio, Odorheiu S. SZÁSZ,Csaba (OS)
Rumanio, Odorheiu S. SZÁSZ, Enikó (OS)
Rumanio, Odorheiu. MOLNÁR,Jozsef(OS)
Rumanio, Ruganesti. INCZEFI, Tibor (OS)
Tanzanio, Dar-es-Salaam. MASHAURI, Constantine (Bergen julie)

Protokolo de sukcesintoj en la meza ekzameno 1991

(67 personoj el 15 landoj)

Lando, urbo, nomo, sesio

Belgio, Hasselt. BERX, Peter (Bruselo sept)
Belgio,Oostende. WYLLEMAN, Raymond (Br)
Belgio, Polleur. JACOB, Joseph (Br)
Belgio, Verviers. JACQUES, Jean-Marie (Br)
Belgio, Warneton. THUMERELLE, Jean-Claude (Br)
Belgio, Welkenraedt. GRELA, Marie (Br)
Brazilo, SaoPaŭlo. LADALARDO,Maria (VT)
Britio, Laverstock. KNOWLES, Katie-Yvonne (Be)
Bulgario, Gorna Orjahovica. BUJUKLIEVA, Penka (VT)
Bulgario, Bjala Slatina. DIKOVA, Mariana (VT)
Bulgario, Sliven. DIMITROVA, Ĥristina (VT)
Bulgario, Sofio. ENĈEVA, Tatjana (VT)
Bulgario, Burgas. ENEV, Enjo (VT)
Bulg., Pazarĝik. FILIPOVA, Gvozdenka (VT)
Bulgario, Sofio. KOSTOVA, Cvetanka (VT)
Bulgario, Varna.ŜIVAROV, Aleksander (VT)
Bulg., Vraca.TRIFONĈOVSKI,Ljubomir (VT)
Ĉinio, Tianjin. MA Xin, (H)
Ĉinio, Lianxian. HE Benfa (H)
Ĉinio, Hefei. LIU Baoguo (H)
Ĉinio, Xiuning. WU Lin (H)
Ĉinio, Fuyang. YUAN Yingchun (H)
Ĉinio, Hefei. ZHANG Cuilan (H)
Ĉinio, Chengdu. CHEN Wankuan (G)
Ĉinio, Jingdezhen. YU Ximei (G)
Ĉinio, Guangzhou. YANG Hong (G)
Ĉinio, Guangzhou. LIU Weizhuang (G)
Ĉinio, Guangzhou. LIN Yihua (G)
Ĉinio, Xining. JIA Wende (G)
Ĉinio, Guangzhou. HUANG Yiwang (G)
Ĉinio, Tianjin. SONG Jingquan (T)
Ĉinio, Tianjin. HAN Zuwu (T)
Ĉinio, Tianjin. HAO Weining (T)
Ĉinio, Tianjin. QIN Yajun (T)
Ĉinio, Chengde. SHANG Junyi (T)
Ĉinio, Weifang. JIANG Yude T)
Finnlando, Abo. RITAMAKI, Anna (Be)
Francio, Ales. VIGNE, Henri (Be)
Hungario,Celledömölk. TINGER,Tünde (Sz)
Hungario, Köszeg. MURANYI, Péter (Sz)
Hungario, Noszlop. MAGYAR, Istvánné (Sz)
Hungario, Pápa. NÉMETH, Joszef (Sz)
Hungario, Pápa. VERRASZTÓ Ágnes (Sz)
Hungario, Pápa. NEHÉZ, Judit (Sz)
Hungario, Pápa. KOVÁCS, Attiláné (Sz)
Hungario, Sopron. NÉMETH, Csaba (Sz)
Hungario, Zalaegerszeg. BUDAI, Tibor (Sz)
Hungario, Zalaszabar. KIRSCH, János (Sz)
Irano, Tehran. KHEYR-KHAH, Reza (Be)
Jugoslavio, Mali Idjoš. VIRAG, Csilla (S)
Jugoslavio, Subotica. VOJNIC, Blasko. (S)
Nederlando, Eindhoven. SLUIJTMAN, Willem (Be)
Nederlando. Niewegein. VERWEIJ, Jacobus (VT)
Rumanio, Bixad. TRIFOI, Mihail (OS)
Rumanio, Bucuresti. CONSTANTIN, Marian (la venontaj 13 Odorheiu S. aprile))
Rumanio, Gheogheni. BALÁZS, Aliz (OS)
Rumanio, Gheogheni. BALÁZS, István (OS)
Rumanio, Mercurea Ciuc, SÁNDOR, Dénes
Rumanio, Odorheiu S. SZEKELY, Szabolcs
Rumanio, Odorheiu S. SZÁSZ, Lenke Anna
Rumanio, Odorheiu S. NAGY, Kornelia
Rumanio, Odorheiu S. KUSTÁN, Ladislao
Rumanio, Priad. SZÁSZ, Lenke (OS)
Rumanio, Sibiu. ALBU, Vasile (OS)
Rumanio, Timisoara. STOICA, Angela (OS)
Sovet-unio, Minsk. JAROŜEVIĈ, Vojtek (VT)
Svedio, Karlskoga. FORSMAN, Lars (Be)

Ĉu vi iam scivolis, kiel skribi 'ILEI' en la ĉina? Se jes, respondon vi ricevos sur la titolpaĝo de la ĉina eldono de nia ekzamena gvidilo. Tiu du-lingva versio estas duoble pli ampleksa ol la orginialo.

国际世界语者教师协会

KONFERENCA KAJ KONGRESA KOMUNIKO

La Tago de la Lernejo en la UK (Vieno, la 28-an de julio, mardon) konsistos el 4 partoj: De la 9a horo ĝis la 13a:

- La estraro donos koncizajn informojn al la kongresanoj pri la pedagogia faka agado, instrulaboro kaj ekzamenoj;
- Leciono estos prezentata, eta fragmento el la Gimnazio por stimuli publikajn metodikan diskuton kaj spertinterŝanĝojn;
- Al Komenio estos dediĉita la sekva parto de la Tago por konsciiĝi pri liaj teologiaj, filozofiaj kaj pedagogiaj ideoj, ĉar pluraj el ili ankaŭ nuntempe estas aktualaj kaj freŝaj.

Je 16h okazos registriĝo al elementa kaj meza lingvo-ekzamenoj de UEA/ILEI kaj 1a skriba antaŭtesto.

La ILEI-Konferenco (1-7 aŭg., Bratislava, Ĉeĥ-Slovakio) havas la kadrotemon "Methodus linguarum novissima", kun adapto en Esperanto: La plej novaj metodoj de la fremdlingvo-instruado. Tamen ne nur metodoj, sed ankaŭ prezento de efikaj manieroj, procedoj, teknikoj, demonstrado k.s. estos bonvenaj. La faka programo de la Konferenco dividiĝos je tipoj

A) Prelegoj

- D-ino Barandovska-Frank: "Methodus linguarum novissima", kiu estas pli ol metodika verko, ĉar ĝi enhavas la pansofiajn strebojn de Komenio;
- S-ro Malovec, M.: Pri la vivovojo de Komenio;
- D-ro Dahlenburg, T.: La kompleksecо de la eduka procezo;
- D-ino Martonova, M.: La pozicio de instruisto en la instruado de fremdaj lingvoj inkl. Esperanto.

B) Praktikaj lecionoj . Ĉiutage ni spektos 1-2 studhorojn de la Gimnazio aŭ provlecionojn de C-nivelaj Cseh-seminarianoj. Tio estu instigo por pridiskuti edukajn, didaktikajn kaj metodikajn aferojn. Instruistoj de diversaj fakoj (ekz-e matematiko, geografio, muziko ktp.) estas aparte invitataj al la Konferenco!

C) Okazos C-grada Cseh-seminario dum la tuta Konferenco kun 6-8 instruontoj. Ĝin gvidos s-ino Smideliusz K. Rilate al Cseh-kurso kaj seminario kontaktu la Internacian Esperanto-Instituton: Riouwstraat 172, NL-2585 HW DEN HAAG.

Interesuloj povos sekvi ankaŭ seminarion pri la Esplor-kreiva vojo, gvidatan fare de s-ro Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB SCHOORL. Informojn petu ĉe li mem: Ni ĉiuj estas invititaj fare de ges-roj R. kaj F-G. Rössler por spertiĝi, kiel instrui E-kantadon kaj muzikon, kian kvaliton, kun kiuj celoj.

D) Vesperaj spertinterŝanĝoj: en "metodikaj metiejoj". i.a. Horst-Kolinska, M,: Kiel instrui por ne perdi kursanojn; Stoica: Kiel prilabori tekston; Keresztthegyi, T.: Piktogramoj kiel demonstriloj en la E-instruado, k.a,

E) Kurantaj aferoj de la Ligo: ekzamenoj, sekcioj, financoj, eldona agado.

Krom la fakaj kaj organizaj programeroj ni antaŭvidas
- ekspozicion de riĉa Esperantaj-kolektajo de s-ro Geleta E,;
- viziton al lokaj kaj regionaj vidindaĵoj enkadre de ekskurso ;
- neformalan kunestadon inter ni kaj kun la geknaboj.

ILEI-Gimnazio, t.e. internacia somera gimnazia semajno por l3-16-jaruloj, Ĝis nun aliĝis 10 geknaboj el 6 landoj, sed krome multaj petis informojn, do atendeble baldaŭ pleniĝos la 20 lokoj. Estas ankoraŭ ebleco, ke ankaŭ vi aligu viajn gefilojn aŭ gelernantojn se ili bone parolas Esperanton. Ni kore invitas ilin! Jenaj gekolegoj bonvole entreprenas gvidi lecionojn:

Arnaudov, P, (BG) matematikon; Baross-Korody Zs.(H) E-lingvon; Tvarozek, E, (ĈS) E-literaturon; MacGill, S.(NZ/H) geografion; Ge-sroj Rössler, (Germ) muzikon, kantadon. Specialajn okupojn gvidos: Barcsay Zs. (H) porjunularajn lecionojn pri Komenio; Dr.Dahlenburg, T. (Germ.) konversacion; Geleta E. (ĈS) - gvidadon tra ekspozicioj ktp.; Kwasniewicz, H. (PL) dancadon; Tilleux-Craenhals, G. (B) ludojn. Ni atendas ankoraŭ instruiston pri sporto kaj aŭ pri arto/manlaboro. Proponu kompetentajn personojn, se vi scias pri tiaj! Ĝis la revido en la Konferenco kaj Gimnazio en Bratislava!

BARCSAY Zsuzsa (adreso kovrile)

Kotizoj por la konferenco restas senŝanĝaj ĝis la 30a de junio! Komuna aŭtobuso je tre favora prezo veturos de la UK je 15.00h en sabato.

La nederlanda sekcio faris laŭdindan decidon: ili decidis finance ebligi la ĉeeston de unu juna nederlandano en la Gimnazio. Sekvinda ekzemplo!

LKK malfermis specialan konton, kiun rajtas uzi ĉeĥoj kaj slovakoj kaj aliaj reform-eŭropanoj povantaj antaŭpagi en kronoj.

Všeobecná úverová banka,
Poprad: 18431-562/0200.

METODIKO

Kiel instrui por ne perdi kursanojn?

Mila van der HORST-KOLINSKA

La legantoj certe aŭdis pri la fenomeno, ke dum kursoj, gvidataj laŭ Cseh-metodo, malofte iu lernanto forlasas ĝin, sed, kontraŭe, tiaj kursoj ofte finiĝas kun pli da kursanoj ol komenciĝis, kompreneble se gvidis ĝin **bona** Cseh-instruisto.

Ĝis nun oni ne analizis tiun fenomenon, kvankam neniu alia instrumetodo atingis tian rezulton. Miaopinie tiu fenomeno de Cseh-metodo fontas ĉefe el jenaj bazaj principoj de la metodo:
- fremdlanda instruisto, kiu kapablas instrui al plurnaciaj lernantoj (por krei naturajn kondiĉojn komuniki en lernata lingvo)
- ne-uzo de lernolibro kaj nacia lingvo (por lerni pensi en lernata lingvo)
- konversacia formo (por uzi parole la lingvon ekde la unua leciono)

- komprenigado de vortoj kaj gramatikaj reguloj per prezentado de objektoj, per gestoj, konvenaj ekzemploj kaj ekzercoj (por pli facile kompreni la funkciadon de la lingvo)
- sekvo de la didaktika regulo gvidi la lernantojn de konataĵo al nekonataĵo, kiun Cseh nomis „gimnastiko por la cerbo", per uzo de jam konataj vortoj por skribi la nekonatan (ekzemploj troviĝas en la Konversacia Vortareto)
- sekvo de la metodikaj paŝoj (necesaj por ĈIU instrumetodo):
  a) prezento de nova materialo
  b) praktikado kun eventuala korektado
  c) ripetado pere de aplikado

El la ĵus menciitaj principoj oni povas konkludi ke sukceso aŭ malsukceso *ĉefe dependas de la kapabloj de la instruisto*. Bonan instruiston oni bezonas por ĉiu-speca kurso, kompreneble. Cseh diris: „Instruisto kapablas sukcesigi la plej malbonan metodon kaj detrui la plej bonan". Bona Cseh-instruisto estas trejnata instrui la lingvon ĉefe al plurlingvaj lernantoj. Ŝi/li devas
- * ŝati instru-laboron kaj facile kontakti kursanojn
- * bone koni, kompreni kaj uzi parole Esperanton
- * esti konvinkita pri la valoro de Esperanto
- * kompreni la metodon kaj fidi en ties efiko
- * esti kapabla kapti atenton kaj teni ĝin dum la tuta renkontiĝo
- * esti aktiva, sprita, eĉ aktoreca, sed precipe natura kaj pacienca
- * esti kapabla krei amikan etoson, vigligi kursanojn, veki intereson, racie prezenti la lingvon, montri la praktikajn valorojn de Esperanto, adaptiĝi al ofte ŝanĝiĝantaj kaj ne anataŭvideblaj kondiĉoj kaj situacioj
- * esti inventema, konsekvenca kaj akurata, sed ne enuiga
- * esti tre bone preparita por ĉiu renkontiĝo
- * havi bonan kaj klaran prononcadon
- * Ne paroli mem tro multe, sed gvidi konversacion, uzante *KI*-demandojn kaj evitante *ĈU*-demandojn.

Traleginte tiujn postulojn oni povas dubi ĉu tia instruisto ekzistas. Parte dubantoj pravas, ĉar mi ja prezentis *idealan* Cseh-instruiston kaj mi scias ke idealoj ne ekzistas, tamen oni devas konscii *al kio strebi* kaj kion provi atingi!

Manko de devoj karakterizas la metodon: ĉio okazu libervole; la kursanoj ja venas ankaŭ libervole al la kurso! La etoso estu agrable leĝera, do alloga por reveni (sen lerneja disciplino). Tamen... estas tasko de instruisto gvidi la tuton tiel, ke la kursanoj post ĉiu renkontiĝo tuj spertu utilon kaj havu la senton ke ili lernis ion novan. Manko de tiu sento kaŭzas perdon de kursanoj!

Intence en la libro *Baza Cseh-kurso*, kun metodikaj konsiloj por kursgvidantoj, la instru-materialo ne estas dividita en lecionojn, sed en punktojn kaj temojn, por ke la instruisto povu facile adapti ĝin al la nivelo de kursanoj kaj uzi ĝin laŭ bezono kaj ne laŭ devo (al kio devigas libro, dividita en lecionojn).

Resume mi citas la eldiron de Andreo Cseh ke „kurso fiaskas ne pro malbonaj lernantoj sed pro nebona instruanto". Pri tio oni klopodas edukcele

konsciigi la Esperanto-instruantojn dum Cseh-seminarioj, por ke ili estonte ne perdu kursanojn, ĉar tiuj perditoj jam ne plu revenos kaj ofte fariĝos kontraŭuloj de Esperanto. Kaj ĝuste tion ni nepre evitu!

Mila van der HORST-KOLINSKA
Hengelolaan 1158, NL-2544 GT Den Haag

Reviviĝo en Rumanio

Nome de Rumania Esperanto-Asocio mi informas vin, ke oni fondis instruistan sekcion ankaŭ en Rumanio. Tio sukcesis ĝuste post la Internacia Metodika Seminario de ILEI en Odorheiu Secuiesc en aprilo 1991, kie okazis la lasta multnombra kunveno de rumaniaj esperantistoj. Ĉar la vojaĝkostoj dekobliĝis, alia aparta kunveno ne eblis, do ni kaptis la okazon renkontiĝi dum la junulara kongreso de REJO en novembro 1991. Estis reprezentitaj precipe tri regionoj de nia lando: Oradea, Baia-Mare kaj Timisoara. Tie ni diskutis ILEI-aferojn.

La estraro de la sekcio konsistos el unu reprezentanto de ĉiu regiono kun aktiva instrua agado, nuntempe: Cluj, Baia-Mare, Sibiu, Brasov, Oradea, Suceava, Miercurea-Ciuc, Craiova, Bukuresto kaj Timisoara. Tiuj reprezantantoj ricevos niajn enlandajn cirkulerojn kaj informos la ceterajn esperantistajn instruistojn pri la enhavo.

Almenaŭ dek personoj membriĝis al la internacia ILEI; la sekcio havas plie dudekon da membroj, kaj pliaj trideko da instruistoj deklaris sin esperantistoj aŭ eĉ instruas la lingvon. Ekzistas multaj personoj en REA, kiuj ne profesie instruas, sed emus instrui Esperanton. Por tiuj ni planis metodikajn kursojn kadre de la sekvonta kongreso de REA. Ni havos poste regulajn kunvenojn de la sekcio. Okaze de la REA-kongresoj okazos demokratiaj elektoj por la estraro de la sekcio. Ni sukcesis abonigi ĉiujn Esperanto-instruistojn al *Juna amiko*, kiu restas la plej abonebla gazeto por ni.

Depende de ekonomiaj faktoroj, ni klopodos organizi somerajn kursojn de Esperanto en la montara regiono Baia-Mare. En Timisoara ĉeestas centoj da studantoj en nedevigaj kursoj je tri niveloj, kiuj fermas la studojn plejperte per skriba aŭ buŝa ekzamano. Ok personoj instruas Esperanton en la Universitato. Kelkaj studentoj jam partoprenis E-ajn arangojn, precipe en Bulgario (1991), Svislando kaj Norda Germanio (1992) kun bonaj rezultoj. Aliaj edukaj agadoj:

- Instruistoj el Timisoara pretigis novajn eldonojn de E-rumana kaj rumana-E vortaroj kaj klopodas aperigi ilin.
- Semajnfinaj radio-programoj pri Eo okazis en Craiova kaj Bukuresto.
- Koresponda kurso estas lanĉita en Bukureŝto, sekvos en Timisoara.
- Grupeto da mezlernejanoj kun instruistoj strebas partoprani la ILEI-gimnazion en Bratislavo (Slovakio) somere.

Bonvolu konsideri, ke vivas kaj agadas en Rumanio sufiĉe riĉa instruista movado. Ni promesas plibonigi tiun agadon malgraŭ la soci-politikaj kondiĉoj, kiuj malhelpas nin. Bonvolu konsideri nian aliĝpeton al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj,

Sekciestro: Angela Stoica, Timisoara, Rumanio

RAPORTO PRI LA ESTRAR-KUNSIDO EN BUDAPEŜTO:

Centoj da faroj kaj decidoj

Kvar el la sep estraranoj de ILEI kunsidis dum tri tagoj en Budapeŝto de la 20a ĝis la 23a de februaro. Laŭ la ĉefaj punktoj el ilia tagordo, la Estraro:

1. Landaj sekcioj:

* Konfirmis nomigon de reprezentanto el Albanio.
* Ricevis por plutrakto aliĝpetojn de sekcioj en Rumanio kaj Kroatio kaj interparolis kun reprezentantoj de ambaŭ.
* Pretigis enketilon/gvidilon por nomigo de reprezentantoj kaj alian por fari sekcian aliĝpeton al ILEI, por disdono en Poprad (Seminario pri informado) al ĉeestantoj el la novaj ŝtatoj de la siatempa Soveta Unio. (Dezirantoj petu tiujn dokumentojn).
* Proponas al la komitato regularon por konkurso "Plej aktiva landa sekcio" (Teksto tuj poste dissendita al la sekcioj por poŝta voĉdono)
* Decidis reenkonduki membrokartojn.
* Aperigos novan varbilon/aliĝilon, en ĉi tiu numero de IPR.
* Konstatas, ke la japana sekcio ĉesis funkcii kaj klopodas pri restarigo.

2. Komisionoj kaj planado

* Aprobis trijaran laborplanon, kiu aperas en ĉi tiu IPR anekse al la varbilo.
* Starigis komisionon pri internaciaj lernejaj konkursoj sub gvido de s-ro G. Kurucz, Nyiri u. 11, H-6000 Kecskemét, Hungario.
* Aŭdis raporton de la Terminologia Komisiono, kiu faris peton al ekstermovada fonduso por ebligi kompilon de 5-lingva pedagogia terminaro.

3. Financo

* Ricevis provizoran finkalkulon por 1991, kun modesta pozitiva saldo.
* Modifis la kriteriojn por repago de vojaĝkostoj al estraranoj – por permesi al ekstereŭropaj estraranoj almenaŭ unu vojaĝon al estrarkunsido aŭ konferenco koste de la Ligo ene de la trijara deĵor-periodo. La propono restas ene de la buĝeta limo por 1992
* Proponas, ke la kasisto kaj estraro mem kuratoru la Fondaĵon Szerdahelyi. En 1992 ĝi subtenos la gimnazion de ILEI.
* Decidis pri dudeko da membrigoj el la (tamen malplena) Koleghelpa Kaso.
* Revizios buĝeton 1992 laŭ la nova eldona projekto (vidu sube).

4. Ekzamenoj

* Informiĝis pri la rekorda nombro de sukcesintoj kaj sesioj en la ekzamenoj de UEA/ILEI en 1991 (vidu la protokolon aliloke en la numero; gazetara komuniko estis dissendita al kvindeko da adresoj.)
* Proponas al IEK modifi la regularon, por ke loka ekzamena komisiono rajtu permesi anticipan verkon de la eseo.

* Vokas por kompetentaj helpantoj en la verkado de novaj testoj.
* Bondeziras al la nova sekretario de IEK, s-ino Marie Hunninck.
* Atendas, ke IEK baldaŭ havu denove prezidanton.
* Plupreparos la superan nivelon, kun aŭ sen la longe atendataj regularaj modifoj, kiujn UEA volus fari.
* Konscias pri la neceso eldoni novan gvidlibron, prefere tri-nivelan.

5. Instruado

* Komunikas ke la rezulto de la enketo pri instruado aperos en IPR kaj JA 92/1, sed konstatigas, ke apenaŭ tridek reagoj alvenis.
* Aŭspicios kursojn pri E-instruado en KCE (Svisl.); Tirenio (Italio) se eble en Grésillon (Francio) kaj proponas kunorganizi kurson en E-Centro Bialistoko gvidota de mag. Irena Szanser el Varsovio.
* Kontaktigos vojaĝigeblajn instruistojn kun akceptemaj lernejoj.
* Vokas al universitatanoj plene respondi la enketilon de s-ro G. Pirlot.
* Formulos apog-leteron al la E-fako en la Pedagogia Altlernejo de Szombathely, kies estonteco falis en dubon.

6. Konferencoj

* Konstatas, ke dudeko da aliĝoj alvenis por la 26a Konferenco kaj deko el plej diversaj landoj por la gimnazio kaj ses por la C-grada Cseh-seminario.
* Konstatigas, ke nur la februara revuo 'Esperanto' mencios tiujn aranĝojn.
* Vokas al sekcioj kaj redaktoroj des pli forte diskonigi la du aranĝojn.
* Preparos freŝajn gazetarajn komunikojn pri ili kaj la 'Tago de la Lernejo', precipe kun program-detaloj.
* Ĝojos post-kunside scii, ke la kotizoj anoncitaj en la aliĝilo por la Konferenco kaj Gimnazio povos pluvalidi ĝis la 30a de junio. Tion konfirmis kunsido inter ILEI kaj LKK en Poprad, unu semajnon post la estrar-kunsido.
* Decidis, ke la venonta IMS okazu en Zagrebo printempe 1993.
* Korespondas kun hispanaj sekcianoj pri konferenco tie en 1993.

7. Statuto

* Dissendos la novan tekston nur al sekcioj nun kaj presigos ĝin poste.
* Akceptis regularon pri Honoraj Membroj por pludono al la komitato (Sendita tuj poste al sekcioj por poŝta voĉdono).

8. Eksteraj rilatoj

* Decidis, ke ILEI okazigu kunvenon en la Eŭropa Kongreso en Verono, en aprilo 1992. Gvidos s-ino Marija Belosevic kaj s-ro Edward Symoens.
* Serĉas novan gvidanton kaj kunlaborantojn por Pedagogia Gazetara Servo.

9. Eldonaĵoj

* Akceptis transpreni la eldonadon de la lernejana revuo *Juna amiko* kaj adaptos buĝeton 92 konforme: tio preskaŭ duobligos la jarajn spezojn. Gazetara komuniko diskonigis la novaĵon. Praktike malmulto ŝanĝiĝos: la ekzistantaj perantoj plue funkcios, la konto ĉe UEA same, sed ekde nun la kasisto de ILEI akceptos enpagojn, ĉu de unuopuloj ĉu de perantoj.
* Konfirmis novan redaktoron por 'Internacia Pedagogia Revuo', la hungaran sekciestrinon, s-ino Kovács Márta.
* Aŭdis raporton pri la kurantaj projektoj (Metodika libro Szanser: duonkompostita, presado aranĝita); *Tendaraj tagoj*, dua kajero verkita, desegnaĵoj farataj; *Bonvojaĝo* de Gubbins atendas ĉe Edistudio pro komputilaj malkongruaĵoj, Symoens, *Propedeŭtika valoro de E*, nun unua en la vico de E-dokumentoj ĉe UEA).
* Atendas fakan opinion de prof. Glossop, kaj pretecon de brita kaj usona sekcioj kunlabori, antaŭ ol decidi pri anglalingva verko de s-ro John Ibbotson pri la valoro de Esperanto en instruado kaj kiel instrui ĝin alloge.
* Esploros pri reeldono de *Metodiko en la Praktiko* (Barcsay Zs.)
* Konsideros preni stokon de *Metodiko* de Rakuŝa, kiun UEA planas represi.
* Kuneldonos grandan verkon kun prelegoj el soci-lingvistika konferenco, kies ĉefartikolon verkis prof. Szerdahelyi.
* Starigos internacian perpoŝtan libroservon por la propraj membroj, kiu vendos la eldonaĵojn de la Ligo, kaj tiujn verkojn ricevitajn interŝanĝe por membriĝoj kaj abonoj al *Juna amiko*.

10. Rilatoj kun UEA

* Nomas s-inon Marija Beloŝeviĉ A-komitatano de ILEI en UEA.
* Faros en marto skriban proponon reĝisori kongresan temon pri edukado en iu estonta UK.
* Faros proponon pri honora membro en UEA.

En la kunsidoj la fakoj de ĉeestantaj estraranoj ricevis eksterproporcian atenton; tamen ankaŭ sur la ceteraj kampoj intensa laboro okazas!

La estraro de ILEI kore dankas la hungaran sekcion pro la helpo ricevita en la organizado de la kunsido kaj la ebleco partopreni la Pedagogiajn Tagojn, la ĉefan kunvenon por hungaraj instruistoj en la jaro kaj tie prezenti la internacian laboron de la Ligo.

Bp. 4 mar 92.

El la supraj paĝoj kaj el la trijara laborplano, vi nun klare komprenas kiajn agadojn vi povos subteni per donaco al

Fondaĵo Szerdahelyi de ILEI

Pere de la varbilo meze de la revuo vi povos facile fari donacon, kaj indiki al kiu tereno vi volas destini ĝin. Anticipan dankon!

ENKETILO PRI INSTRUADO EN ELEMENTAJ KAJ MEZAJ LERNEJOJ 1991/92

Belgio

Oostende, "Den Anklap" - Esperanto Klubo "La Konko"; Marc KUFFEZ, Elisabethlaan 295, B-8400 Oostende; ne; ne; 4; 13 - 15-jaraj; 2 jaroj; 80 horoj; 2 h/sem; neoficiala; ekzameno; IK.

Britio

York; York Sixth Form College; John IBBOTSON; 32 Turners Croft, Heslington, York Y01 5EL; jes; ne; 14; 16-jaraj; 3 monatoj; 10 horoj; 1h/sem; oficiala; sen ekzameno; KK.

Chippenham; Sheldon Lernejo, Hardenhuish Lane, Chippenham, Wilts., SN14 6HJ. Malcolm JONES; jes; jes; 5, 13-jaraj; 25 min/sem. Lunĉ-paŭza klubo.

Ĉinio

Jinan, Shandong Universitato, 250100 Jinan; Liu XIAOJUN; jes; jes; 13; 21 -23 jaraj; 2 jaroj; 4 horoj semajne; oficiala; deviga ekzameno, sen ĝi la gestudentoj ne povas diplomiĝi en la universitato; KK.

Xiang Tan, Xiangtan Normala (Instruista) Instituto; Wang Qingsu, 5-501 Xiangtan Normala Instituto, 411201 Xiang Tan; Hunan Prov; jes; jes; 30; 20-jaraj; 1-jara kurso; 110 horoj; 3 h/sem; oficiala; ekzameno; IK.

Estonio

Tallinn, Instruista domo, Raekoja Plats 14, Tallinn. Eve OTSA. jes. 3, 17-60-jaraj. 70 studhoroj.

Tallinn, 44a Keskkool, 200029 Tallinn; Johannes PALU. jes; jes. 13-15-jaraj. 40 min/sem. 35 studhoroj.

Finnlando

Tampere, Lentavanniemen koulu, Lentavanniemenkatu 3, SF-33410 Tampere; Sylvia HAMALAINEN; jes; jes; 6; 9-jaraj; dum daŭro de la lernojaro; 36 studhoroj; 1 horo semajne; neoficiala; sen ekzameno.

Francio

La Ricamarie, infana kurso ekster la lernejo, Jacques DONY, 3 bis rue Jean Jaures, F-42150 La Ricamarie; 4; 11-jaraj; dum la lernojaro; 74 horoj; 2 h/sem; neoficiala; sen ekzameno.

Carpentras, Marie HUNNINCK, Centre Culturel 'La Charité', B.P. 136, F-84200 Carpentras. 5, 10-13-jaraj okaze de semajnfinaj staĝoj.

Outreau, College Albert Camus, Rue du Pres. Kennedy, F-62230 Outreau. S-ino Moniquie NOEL. Jes; Ne. 10 + 19, 10-14-jaraj. 1 studhoro semajne. Klubo.

Germanio

Hamburg, Hamburga Esperanto-Klubejo, Klaus Groth str. 95, D-W-2000 Hamburg 26; Hella LANKA, Grunewaldstr.2, 2000 Hamburg 52; ne; ne; 12 komencantoj, 7 progresantoj; 26 - 68-jaraj; duono da jaro; 60-80 studhoroj en 24 lecionoj; 4 h/sem. komencantoj, 6 h/sem. progresantoj; neoficiala; okazas ekzameno; IK.

Duisburg, Stadt. Gemeinschaftsgrundschule, Krefelder Str. 47, D-W-4100 Duisburg 14; Heinz Gerd DIESENHOFF; jes; ne; du grupoj- I-10 infanoj, II-8 infanoj; 9-jaraj; 1 jaro; 70 - 80 studhoroj; 2 akademiaj kaj 1,5 horloĝa; neoficiala; sen ekzameno; IK, KK

Kolonjo, Stadtisches Gymnasium Schulstrasse, Schulstr. 18, D-W-5000 Koln 71; Harald SCHMITZ; jes; jes; 6; 11-18-jaraj; 2 jaroj; 140 studhoroj; 2x45 min./sem. neoficiala; ekzameno; KK.

Rottweil, Leibnitz Gymnasium, Heerstr. 140. D-W-7210 Rottweil; Lothar MAHN; ne; jes; 8; 12-18-jaraj; dum la lernojaro; 5-semajnaj diversgrupaj kursoj; 1 h/sem; neoficiala; ekzameno.

Haitio

Port-au-Prince, College Bethesda, Rue Lamarre. Adrien LUZINCOURT. Jes; ne. 25, 19-30-jaraj. 2 studhoroj/sem, 24 entute. En oficialaj horoj sabate. bezonas librojn kaj kontaktojn.

Hungario

La Hungara ILEI sekcio raportas 1688 lernantojn en 1991/92: 20 en infan-ĝardenoj, 137 en klasoj 1-4, 601 en klasoj 5-8 de elementa lernejo, 675 en mez-lernejoj, 167 en altlernejoj, inkl. 12 en instruistaj trejnejoj kaj 88 en universitatoj, el kiuj 23 instruistoj. Pluraj instruistoj krome raportis rekte al ni:

Eger, Geza Gardonyi Gimnazio H-3300 Eger, Csiki u. 1.; BALOGH Viktoria, H-3300 Eger, Malomarok u. 40; jes; ne; tri grupoj: I-11 personoj; 17-18 jaraj; 2 jaroj; 60 horoj; 2 h/sem.;oficiala; kun ekzameno; IK. II-a grupo 14 personoj; 19-20 jaraj; 2 jaroj; 160 horoj; 3 h/sem; oficiala; kun ekzameno; IK. III-a grupo 15 personoj; 19-20 jaraj; 2jaroj; 160 horoj; 3 h/sem; oficiala; kun ekzameno; IK.

Eger, 9.sz. Altalanos Iskola, Vallon u.2; DOMBOROCZKI Ignacne, H-3300 Eger, Hadnagy u. 10. II/5; jes; jes; 8; 8-10-jaraj; 3-4 jaroj; 50 horoj jare; 2 h/sem; neoficiala; sen ekzameno; KK.

Kecskemet, Banyai Júlia Gimnazium, Nyiri út 11, H-6000 Kecskemet. S-ino Elizabeth kaj s-ro Geza KURUCZ. Jes; jes. 111 lernantoj, 15-17-jaraj. 2-3 studhoroj/sem., 350 entute. Ŝtata ekzameno. Volas korespondi.

Kisgörbo, Körzeti Altalanos Iskola, H-8356 Kisgorbo; d-r SÁMSON László. Jes; jes. 47, 8-12-jaraj. 9 studhoroj entute por diversaj grupoj. Oficiala. Dez. koresp.

Matrafured, Körzeti Alt. Iskola és Diákotthon, Udulosor 1, H-3232 Mátrafured. KISS József. Jes; jes. 8, 13-14-jaraj. 2 h/sem., 50 entute. Neoficiala. Dez. kor.

Papa, Nagy László Alt. Iskola, Anna tér 1., H–8500 Pápa. NÉMETH József, KOVÁCS Attiláné, 9+46+25+8, 11-14-jaraj. 2h/sem, entute 60-140.

Sarkad, Endre Ady Eksperimenta Mezlernejo, Vasut u. 2, H-5720 Sarkad, d-ro Georgo FLENDER. Jes; jes. 8+17+10+12, 16-18-jaraj. 4h/sem. 192 entute.

Italio

Massa, Villette B, Via S.G. Vecchio, I-54000 Massa. Ionne BERTOZZI. Jes; ne. 14, 11-jaraj. 2h/sem. 50 entute. Oficiala kun ekzameno. Dez. kor.

Jugoslavio

Novi Becej, elementa lernejo, ul. M. Tita 5. F-ino Agnes SANISLO. Jes; jes. 15, 12-jaraj. 1-2h/sem., 50 entute. Ne-oficiala. Dez. kor.

Koreio

Seulo, Dankook universitato, Hannamdong, Seulo 140-714. MA, Young-tae. 300 studentoj, 20-jaraj. 2 h/sem, 16 semestre. Oficiala kun ekzamenoj. Grupan korespondadon dezirata.

Kroatio

Zagreb, Bazlernejo 'Bartol Kaŝic', Marija BELOSEVIC. Jes; Ne. 12, 11-14-jaraj. 2h/sem. 70 entute. Similaj klasoj en du pliaj lernejoj.

Nederlando

Apeldoorn, Nosobe Roosdorp Studie Fonds, J. Verheule, Jachtlaan 232, NL-7312 GR Apeldoorn. 6, 30-70-jaraj. 30h/sem, 200 entute. Oficiala.

Nigerio

Illeh Ekpoma, Universitato de Ekpoma, P.O. Kesto 62, Ekpoma. D-ro Godwini I. OBOH. Jes; jes. 45, 8-20-jaraj. 10h/sem. 300 entute. Oficiala. Dez. kor.

Pollando

Mikolow, Klubejo Ognisko Pracy Polaszkolnej 2, K. Miarki 9, PL-43190 Mikolow. Felicja KOSTOW. 15, 8-11-jaraj. 2h/sem. Ne-oficiala. Volas interŝanĝi kantaretojn.

Stomniki, Elementa lernejo, Swierczewskiego 2, PL-32-090 Stomniki. Ewa KASZUBA. 20, 10-jaraj. 2 h/sem. Oficiala. Sen ekzameno. Dez. kor.

Tychy, Elementa Lernejo 1, ul. Tolstoya 1, PL-43-100 Tychy. Hanna KWASNIEWICZ, Jes; jes. 20, 8-14-jaraj. 2h/sem.

Rumanio

Oradea, Bazlernejo 16, Calugareni 4, R-3700 Oradea. Suzanna BARABAS. Jes; ne. 32, 12-jaraj. 1h/sem. Neoficiala. Ekzameno. Dez. kor. kaj ricevi lernolibrojn.

Praid, Scoala Generala 'Aprily Lajos', R-4174 Priad. Lenke SZASZ, Jes; jes. 30, 10-

14-jaraj, 1h/sem. 30 entute. Oficiala fakrondo. Dez. kor.

Svedio

Karlskoga, Popola alt-lernejo, 8-semajnaj kursoj (v. IPR 91/4)

Ukrainio

Kievo, Mezlernejo 263. Svetlana FEDOTOVA, P.O. Kesto 88, UKR-253222 Kiev. Jes, ne. 36, 11-16-jaraj, 6h/sem. 102 entute. Oficiala. Dez. kor. kaj kontaktojn.

Komplemente al ĉi tiu enketilo estas tiu pri la instruado je universitata nivelo. Nun estas la post-lasta momento raporti viajn kursojn al s-ro G. Pirlot, Steenbakkerstraat 21, B-8400 Ostendo, Belgio. Uzu niajn rezultojn starigi kontakton kun lernantoj en eksterlando.

ALVOKO PRI INSTRUISTO-BORSO

Instruistoj, kursgvidantoj, kiuj estas kompetentaj kaj entreprenemaj gvidi kursojn en diversaj landoj, bonvolu skribe anonci vin ĉe ILEI.

Kelkfoje venas deziroj havi eksterlandan kursgvidanton. Pro tio necesas, ke la koncerna respondeculo de ILEI havu je dispono nomojn, adresojn kaj informojn pri vojaĝemaj gekolegoj. Kiu volonte reagas je ĉi tiu alvoko, bv. letere komuniki la jenajn indikojn:

Nomo, adreso kaj telefon-numero. Gepatra lingvo, aĝo. Esperantaj ekzamenoj (tipo, grado). Profesio, fakoj, ĝisnuna instruagado. Nivelo de kurso prefere gvidota. Metodoj, lernolibroj, instruiloj prefere aplikotaj. Sezonoj en la jaro libera por vojaĝi, dum kiom da tempo. Kiaj kondiĉoj estas postulataj. Aliaj indikoj rilataj.

ILEI unuavice celas peri inter serĉantoj kaj sin proponantoj. Subvencii kurson aŭ kursgvidanton ILEI apenaŭ povas, nur en tre malmultaj kaj la plej indaj kazoj. Do, kontrakto aŭ interkonsento devas estiĝi inter la kurs-organizanto kaj la kursgvidanto.

Ni atendas viajn anoncojn, proponojn, esperante, ke per ĉi tiu servo ni plifaciligos, plivastigos kaj internaciigos la instruadon de Esperanto, je nia komuna ĝojo kaj utilo. Ĉiun sinanoncon bv. direkti al la Estrarano pri instruado: S-ino BARCSAY Zsuzsa, Bem Rakpart 25/b, H-1011 Budapest; tel. (+ +36 1) 201-2342.

NEKROLOGO:

Rolandus Hagedoorn, Nederlando

El la lasta numero de 'NGGE sciigas' ni kun bedaŭro eksciis pri la forpaso de s-ro Rolandus Hagedoorn , dum multaj jaroj aktiva instruisto en Waalwijk kaj fidela membro de nia nederlanda sekcio. En 1977 lia klaso partoprenis la kvin-landan eksperimenton de ILEI kune kun ĝia unusemajna kulmina renkontiĝo kun ducento da lernantoj apud Namuro en Belgio. Niaj kondolencoj al la familianoj.

EKZAMENAJ SESIOJ EN 1992

Sesioj de la elementa kaj meza ekzamenoj de UEA/ILEI estas antaŭvidataj en Zagrebo en la 15-17a de majo kaj 11-13 decembro. Bulgara Esperanto-Asocio organizos sesion kadre la Internacia Somera E-Universitato en Veliko Tirnovo, 18-22 julio. Povus okazi denove sesio en Kultura Centro Esperantista, kio estus bonvena reaktiviĝo en la ejo, kiu praktike naskis la ekzamenojn. Esprimis deziron pri sesioj ankaŭ Kataluna Esperanto-Asocio, do en Barcelono aŭ Sabadell, ankaŭ en la apudmara kurso en Sete, suda Francio, povus okazi. Supozeble en Ĉinio okazos eĉ pluraj sesioj. Aliaj centroj aŭ kongresoj dezirantaj organizi sesion bv. kontakti la novan sekretarion kaj peti la informilon tiurilatan. (Vidu paĝon 26).

REZOLUCIO EL VOSS

La ekstera rezolucio el nia konferenco de Voss havis konsiderinde malpli da reeĥo ol la interna, kiu estis represita aŭ komentita en amaso da movadaj eldonaĵoj. S-ro Symoens petis el la eŭropaj sekcioj informojn pri la uzo de la ekstera rezolucio ĉe edukaj instancoj. Nur du respondis. La nederlanda sekcio ne prezentis ĝin al instancoj ĉar ili lastatempe prezentis alian dokumenton kun similaj argumentoj. La portugaloj ne prezentis ĝin kiel entuto, sed ja uzis ĝin por helpi en la formulo de dokumento, kiun ili verkis, por peti permeson instrui Esperanton en lernejoj oficiale.

Por la venonta konferenco, se entute ni volas rezolucion, ni starigu laborgrupon por ne nur verki ĝin, sed ankaŭ por decidi kiel eluzi ĝin, kaj ankaŭ kiu konkrete plenumos tiun laboron. Sen tiuj di kompletigaj paŝoj, la unua apenaŭ havas sencon.

LABORGRUPOJ EN LA KONFERENCO

Ni antaŭvidas malpli da kunsidado en la pleno por plenumi nian ligan laboron, kaj pli da laborado en etaj laborgrupoj por atingi specifajn celojn. Unu laborgrupo okupiĝos pri la eventuala rezolucio, alia pri verkado de testoj por niaj ekzamenoj, alia pri pretigo de materialo por la supera nivelo, alia pri elformo de serio de modelaj instru-planoj, alia pri terminologio. Ĉio ĉi kun la celo formi kernon de internaci-nivelaj laborantoj pretaj dividi la ligan laboron inter si. Kiu volus proponi pliajn laborgrupojn, aŭ volonte gvidus aŭ partoprenus difinitajn, anoncu sin!

Atentu, ĉi tiu estas la lasta numero de IPR, kiun ni sendos al membroj, kies kotizoj por 1992 ne atingis nian kasiston. Religu vin kun la Ligo!

POSTPAROLE

Biografieto de la nova redaktoro

KOVÁCS Márta (1958), mezlerneja profesoro pri lingvoj kaj literaturoj hungaraj, francaj kaj Esperantaj. Esperantistiĝis kiel studentino, diplomiĝis en 1981 ĉe profesoro SZERDAHELYI. Aktivas en ILEI ekde 1980, sekciestro ekde 1985. Membro de bone kunlaboranta teamo en Budapeŝto.

Preparis kaj gvidas korespondan lingvokurson, instruis metodikon kadre de superaj kursoj de Hungara Esperanto-Asocio.

Patrino de du gefiloj (naŭ- kaj sepjaraj), ne denaskuloj.

Teknika kunredaktanto de IPR ekde 1991.



C. Dazzini, M. Dazzini, S. Tavĉar, M. Kovács, P. Zlatnar (Foto el 1980.)

Redaktoraj planoj

La filozofia bazo: stimuli kaj prezenti novajn ideojn, samtempe priatentante kaj spegulante la kontinuecon de ILEI. Tion celas sugesti ankaŭ la supra historia foto.

Laŭ la reagoj de la legantoj necesos trovi taŭgan proporcion de teoriaj artikoloj, de praktikaj helpiloj kaj de organizaj informoj. Estas planite paroli ne nur pri instruado de Esperanto, sed *per Esperanto* ankaŭ pri *aliaj* studobjektoj.

Serve al tiuj celoj urĝas restarigi redaktan komitaton, por ke pere de pliaj rektaj kontaktoj alvenu kontribuoj el la plej diversaj regionoj, tiel la revuo iĝu ankaŭ pli internacia.

En tiu ĉi numero vi jam spertas la klopodojn denove proponi konstantajn rubrikojn.

Pri VIAJ proponoj kaj rimarkoj mi senpacience atendas VIAJN sciigojn!

SALUTON AL LA LEGANTOJ

Kovács Márta

KALENDARO

Aprilo

13-20 8a Printempa Semajno Insternacia (PSI), Ahrweiler (Rejnlando). Aparte bonvenaj E-familioj. 125-340 DM. Wolfgang Bohr, Joh.-Kirschweng-Str. 11, D-W-5483 Bad Neuenahr-Ahrwiler.

18-25 Internacia Renkonto de Infanoj, Kastelo Gresillon, Bauge (apud Angers). Informoj: Esperanto, Gresillon, F-49150 Bauge.

24-3majo Berlina Arbara Renkontiĝo, Bad Munder (apud Hanovro). 15 DM tage, 130 DM por 10 tagoj. Michael Peters, Steglitzer Damm 32, D-1000 41.

Junio

24-9jul. Internacia Amika Renkonto, Grésillon. (vidu supre)

28-3jul. 25a Somera Studsemajno en Jyvaskylä (Finnlando). Trigradaj studrondoj. 500 finnaj markoj. Petu informojn kaj belegan urban prospekton en Esperanto de Terttu Tyynelä, Taidepolku 6 J, SF-40720 Jyväskylä.

Julio

9-22 Prelegoj kaj kursoj. (Grésillon)

18-24 Seminario pri urboplanado, Berlino, 150-250DM. Germana Esperanto-Junularo, Unter den Linden 38, D-O-1086 Berlin.

23-5aug. Cseh-metodaj kursoj, Gresillon.

25-31 77a Universala Kongreso, Vieno. Informoj de UEA. Inkluzivas 15an Esperantologian Konferencon, ISU kaj 'Tago de la Lernejo' (marde).

Aŭgusto

1-7 26a KONFERENCO de ILEI kaj ILEI-Gimnazio, Bratislavo, (CS).

2-9 48a Internacia Junulara Kongreso, Montrealo, Kebekio. Temo: Libertempado. 200-350 kanadaj dolaroj. LKK, 6358-A rue de Bordeaux, Montreal, Que., H2G 2R8 Kanado.

3-9 Internacia Junulara Semajno, Esztergom (H). 100-350 gld. La plej internacia mez-eŭropa junulara aranĝo. LINGVO-Studio, pf. 87, H-1675 Budapest.

6-19 Lernu, praktiku kaj perfektiĝu. Kursoj en Gresillon.

9-16 MEJS: Mez-Eŭropa Junulara Semajno, Olomouc, Ĉeĥ-slovakio. Temo: Ĉu komuna lingvo sufiĉas? Mez-eŭropo prezentas sin. 100 ĝis 240 DM. Student-Centro Esperanto, Krizkovského 14, CS-772 00 Olomouc.

13-18 Eŭska Montara Aventuro, Alsasua (vilaĝo en suda Eŭskio, 75km. de la franca limo). 9.000-13.000 pesetoj. Antton Ameyugo, Gorbea, 4-2.dcha. E-01008 Vitoria-Gasteiz.

17-23 14a Somera Studenta Esperanto-Renkonto, Gdánsk (PL). Temo: Kun PSEK (Pola Studenta Esperanto-Klubo) en la duan jardudekon. 140-220 DM. Adam Cholewinski, ul. Kolobrzeska 42 D/76, PL-80-394 Gdansk.

20-27 Kurso por instruistoj, KCE, La Chaux-de-Fonds, Svislando. Vidu sube.

20-2sept. Instruado kaj instru-helpiloj. Kurso kunlabore kun ILEI. Kastelo Gresillon.

Septembro

12-19 17a Internacia Semajno, Sete, marborde sud-Francie. Plurnivelaj kursoj. Centre Culturel Esperanto, 5 Rue du Docteur Roux, F-34000 Montpellier.

Oktobro

9-12 Interlanda Konferenco pri Instruado. Chaco, Argentino. Temo: Didaktikaj lingvaj ludoj kaj kanzonoj dum instruado. La argentina ILEI sekcio kunorganizas kun argentinaj kaj brazilaj instancoj. Aliĝo: US$5-20. Rubien T. Diaconu, str. Yugoslavia y Esperanto, RA-3700 Pcia Roque Saenz Pena, Chaco.

INSTRUISTA KURSO EN KCE

De la 17a ĝis la 22a de aŭgusto 1992, Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds ofertos kurson pri moderna komunikada lingvo-instruado. Ĝin gvidos d-rino Koutny Ilona el la Esperanto-Fako de Universitato ELTE en Budapeŝto sub la titolo: "Metodiko en praktiko por E-instruantoj."

Aŭdinte pri ĉi tiu aranĝo, ILEI proponas aŭspicii ĝin kaj eldoni plenum-ateston al la kurs-finontoj. La kurs-dononto verkis la sekvan priskribon pri la enhavo:

Niaj lernolibroj kaj metodoj ofte estas tradiciaj, kvankam Esperanto speciale taŭgas por komunikado jam en la komenca nivelo. La partoprenontoj de la kurso – instruantoj aŭ interesiĝantoj – kune analizos la faktorojn de la komunikada metodo por Esperanto; ili ricevos utiligeblajn ideojn kaj aplikos ilin en elektitaj terenoj. La kurso refreŝigos, aktivigos kaj plilarĝigos la vortprovizon de la partoprenantoj en interesaj situacioj kaj dram-ludoj.

REPREZENTANTOJ

Albanio : Bardhyl Mezini, p/a Albana Esperanto-Ligo, Gafur Mučo, Rruga «Thanas Ziko» Nr.56, Tirana
Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafr. Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Hindio : Abani Halter, Jamboni, P.O.Bolpur 731204, W. Bengal
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Niĝerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel
Rumanio : Angela Stoica, Platanilor 17, Sc. C, ap.4, R-1900 Timişoara; tel.(961) 59806
Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende; tel. (059) 70.87.00
Didaktikaj lud(il)oj : Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle; tel. (071) 43.62.05
Eŭropa Komunumo 92 kaj informado en internaciaj pedagogiaj medioj :
E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (32 3) 666.62.66
UN-Jaro de la Familio 94 : MacGill-Glossop
Gazetara Servo : W. Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (43 222) 36.86.29
Terminologio : K. Smideliusz, Apáczai sétány 10, H-9700 Szombathely, Hungario; tel. (36 94) 20-313
Statuto : O. Hoekstra & R. Moerbeek, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (31 2209) 15.65
Ekzamenoj : Marie Hunninck, Centre Culturel «La Chanté», B.P. 136, F-84200 Carpentras;
Konkursoj lernejaj : Géza Kurucz, Nyiri u. 11, H-6500 Kécskemet

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C), 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris
UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam
IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag
KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuaĵoj al IPR Tajpitaj nete per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, aŭ komputile sur 5,25-colaj disketoj per IBM-PC-kongrua sistemo kaj konata tekst-prilaborilo, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon). Skribu viajn nomon kaj adreson sur la manuskripto.

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI (membrokotizo 50 Svedaj Kronoj):
1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.